104

MARTO / APRILO 1993

ISSN 0150-5823

Dumonata esprimilo eldonata de **Amika Esperanto-Rondo**
Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE
**Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF**
**Speciala abono por nepagipovaj landoj : 40 FF**
Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE
Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

**Ludoviko :**

# DEMOGRAFIO

El la senbrida demografio* fontas nenombreblaj suferoj, mizeroj kaj nesolveblaj problemoj. Sed kiamaniere trakti tiun temon racie kaj ne rase ? Ĉar evidentas ke la plago nestas en iuj precizaj regionoj de nia terglobo, tie, kie ĝermas nur homidoj. Mi ne uzas la vorton kreski, ĉar fakte ili naskiĝas, mortas aŭ vegetas mizere en nehomaj kondiĉoj. Tiel estas almenaŭ laŭ la filmoj, kiujn oni povas spekti.

Kompatemaj homoj kaj asocioj provas mildigi ties suferojn : alporti nutraĵojn kaj medikamentojn por savi tiujn popolojn el pereo. Gratulindaj, laŭdindaj, imitindaj estas tiuj meritplenaj personoj, kiuj flegas sindoneme siajn samulojn.

Sed ĉu tiel oni solvos fine la problemon ? Ĉu tiu sistemo povas daŭri senfine ? Mi ne kapablas kredi. Necesas sekvi la evoluon de la **savita** infano, kiu iĝas plenkreska kaj baraktas por trovi vivrimedojn. Kien ? Tien,

nia debato

(daŭrigo p.3)

## LETERO EL SIBERIO

"... En Laŭte 103 plej plaĉis al mi kaj miaj E-gelernantoj en Tomska gimnazio N 24 la letero de Donald J. Harlow pri la dialektoj de la angla lingvo en Usono kaj Anglio. Precipe ravis ilin, ke "voku min matene" en Anglio signifas "mi deziras havi infanon disde vi" en Usono. La gimnazio N 24 estas prilingva, kie oni ekde la 7-jara aĝo studas la anglan lingvon. Kaj la instruistoj sugestas (aŭ eĉ sugestias) al la lernantoj, ke la angla lingvo estas Lingvo Internacia. Kaj tiaj artikoloj ege helpas al e-istoj pruvi al nee-istoj, ke la angla ne estas internacia lingvo, sed tiu estas E-o....

"...Mi proponas senpagan interŝanĝadon de Laŭte kontraŭ "AKTUALE eŭro-azia". Nun la meza salajro en Rusio estas 80 FF. Do la abonkotizo de Laŭte (40 FF) estas tre granda por ni. Por ni malpli koste estas eldoni propran gazeton ol aboni iun gazeton el Okcidento. Tial en Tomsk oni eldonas jam 4 E-peridaĵojn por interŝanĝadi ilin kontraŭ eksterlandaj periodaĵoj...

"... Aŭ mi povas proponi alian varianton : mi ĉi tie estu peranto de Laŭte, kaj Vi tie estu peranto de "AKTUALE eŭro-azia". Vi mem determinu la prezon de "AEA" en Okcidento kaj mi mem determinu la prezon de Laŭte en Rusio. La tutan abonkotizaron de "AEA" vi lasos ĉe Vi, kaj la tutan abonkotizaron de Laŭte mi lasas ĉe mi. Se tiu propono ne taŭgas, mi dezirus legi Vian proponon..."


**V. Minin** (ĉefredaktoro de "Aktuale eŭro-azia")

La redaktanto de **Laŭte** respondas :

Principe, L! ne interŝanĝas kun aliaj E-gazetoj. Ĉefaj kialoj : Estas tiom da E-gazetoj, ke ne kun ĉiuj eblus interŝanĝi. Tio endanĝerigus la kason. Do kiel elekti, laŭ kiuj kriterioj ? La gazetoj ricevitaj interŝanĝe fine trafas nur la respektivajn "redakciojn", sume 2 aŭ 3 personojn. Laŭ la principoj de L!, la "redaktoro" (fakte nur "redaktanto") nenial meritas la privilegion legi gazetojn senpage. Al amiko V. Minin, lojala diskoniganto de SAT-broŝuroj en Siberio ni tamen sendas L! dank'al donaco de solidarema SAT-ano. L! volonte peros abonojn por "AKTUALE eŭro-azia" (libera kaj neŭtrala, kun 8 n-roj jare + suplementoj). Abonkosto : 30 FF.

En sia regiono amiko V. Minin peru do por L! surbaze de : 3 abonoj al L! = 4 abonoj al AEA.





## NIA DEBATO :

kie ĉio troas : viando, lakto, butero, pano ktp. Ĉe tiuj popoloj, kies ekonomia stato sufokiĝas sub stako da troaĵoj.

Kaj kion trafas la feliĉulo, kiu sukcesas atingi la esperitan teron ? Aŭ li estas senkompate forpelita, aŭ li ŝtele alteriĝas kaj aliras aliajn mizerulojn, kiuj jam aĉe vivas en mirlando.

Jen tre simpla skizo pri la trajektorio, ĝenerale, de tiuj kompatinduloj.

Kion fari ? La unua tasko urĝa estas alporti helpon al la jamnaskitoj. La dua estas la tuja bremsado de la naskado, pri kiu neniu parolas nek skribas, eĉ ne la ekologoj, kiuj bone scias ke la plej danĝera predanto de la naturo estas la homo. La homo, kiu daŭre postulas pli kaj pli da komforto riske endanĝerigi sian propran estontecon.

Kiel bremsi la naskadon ? Klerigante la gegenerantojn de la mizeruloj kaj portante al ili la sciencajn kaj teknikajn rimedojn. Se tio ne efikos, necesas kontrolado de la naskado, memvole aŭ devige.

Konklude la problemo havas du solvojn :

- la natura : naski libere kaj morti senhelpe, fruaĝe.
- la scienca : generi kaj vivi sub scienca kontrolo, kaj morti multaĝe.

Se ambaŭ kombiniĝas, jen la senlima demografio*.

----

* en la senco : homplimultiĝo.

Noto de la red. : Nur nelonge antaŭ sia morto nia amiko Ludoviko ENIZAN sendis tiun ĉi enkondukon al temo ja malnova kaj plu nesolvita...
La ĉi-supran desegnaĵeton mi piratis el frontpaĝo de malnova libro de la franclingva verkisto Paul Reboux : "Trop d'enfants?" (Ĉu tro da infanoj?), eldonita en 1951 ĉe Denoël, Parizo. Kristiano.

ĴANSEB'

Eksplodiga demografio estas ĉefa problemo de nia epoko. Nasko de homoj, sen loko antaŭvidita por ili sur nia planedo, estas dramo. Tiuj homoj estas kondamnitaj je malsato, malsano aŭ milito.

Kompreneble, tiu kondamno ne estas individua. Ĉiu havas ŝancon - eĉ etan - pluvivi. Sed jam antaŭkalkuleblas kiom da ne povos.

Kiam tio fontas el homa volo, ne plu estas dramo, sed krimo. Uzi konscie la t.n. "demografian armilon" por plilarĝigi sian influon estas krimo kontraŭ la homaro. Homo ne estas municio.

Plejofte, troa demografio fontas el tradiciaj opinioj, ke necesas havi 10 infanojn, por ke unu el la pluvivantoj havu sufiĉe bonan metion por vivigi la tutan familion, kaj la gepatrojn, kiam ili ne plu kapablos labori. Tiu sinteno estas rajta, kiam ne ekzistas fidinda asekura sistemo. Oni ne povas postuli, ke homo kondamnu sian familion al malapero.

Eksplodo ne estas la sola demografia problemo : estas ankaŭ la t.n. "virina deficito". En iuj landoj "mankas" ĝis 10% de la virinoj. La temo tabuas, sed oni povas supozi, ke viroj kiuj ne havos ŝancon trovi kunulinon estos pli militemaj ol la aliaj...

Aliflanke, la okcidenta civilizacio ne rajtas trudi siajn valorojn al aliaj. Preferi pliajn junulojn ol pluajn maljunulojn estas ankaŭ komprenebla elekto... Sed la Okcidentanoj rajtas helpi unue la landojn, kiuj helpas sin mem pri tiu problemo...

Ĉiuj problemoj interplektiĝas : socia asekuro, ekonomio, ekologio, kulturo, civilizacio. Ĉio estas ligita kaj despli malfacile solvebla, ke niaj estroj kapablas solvi problemojn nur unu post la alia. Sed tiuj ĉi devas esti nepre SAMTEMPE solvataj !

Krom se... oni uzu alian metodon : tutece solvi la problemon sur malgranda skalo, kaj disvastigi la solvon...

Bedaŭrinde, tiu metodo ne estus akceptebla de la povuloj, kiuj preferas aserti ol eksperimenti, ĉar tiel iliaj eraroj estus videblaj, kaj ilia povo minacata...

Sed ĉiuj devas klopodi, por ke ĉiu homo rajtu je loko sur la tero : tegmento, manĝo, laboro, kunulo aŭ kunulino kaj libereco !




## Garolo : La plej danĝera eksplodo.

Ne estas necese klarigi la eksplodon per vortoj, la ĉisubaj, simplaj grafikaĵoj estas multe pli klaraj kaj evidentigas la danĝeron. Mi prezentas ankaŭ hipotezojn pri evoluo de la homkvanto, kaj ni ne forgesu, ke en scienco malfacile ni kapablas abrupte ŝanĝi la iron de kurbo, de trajektorio, sen ke aperos anomalio aŭ katastrofo. En la plej bona hipotezo, kie post konsciiĝo ekde la jaro 2000 la homo volus kaj scius mastri kaj nuligi sian kunikleĉan naskadon, post 200 jaroj ni estos almenaŭ 7 miliardoj da homoj, kiuj ankoraŭ vivaĉos. Se tiu homa konsciiĝo kaj reago ne aperos, do se la ritmo de kresko plu daŭros (pli ol duobliĝo de surtera homkvanto en malpli ol 40 jaroj), la vivebleco por la homa specio (kaj nepre de aliaj specioj) estos for antaŭ la forpaso de 200 jaroj, la tero krevos antaŭ ol ni atingos 30 miliardojn da animoj senditaj de la Dioj ! Tiel estas la danĝera eksplodo, sendepende de pliaj konjektoj kaj argumentoj aŭ Maltusanismoj.

### Pri la kaŭzoj de tiu problemo.

La kaŭzoj de la fenomeno estas tre simplaj kaj facile kompreneblaj. Temas pri rezulto de la homa malkongruo inter la scienca, teknologia evoluo kaj la neevoluo de la etika, morala sinteno kaj konduto. Temas pri la abismo inter la racio kaj la mistiko.



La homoj inventis la kuraciiojn, la vakcinojn kaj antibiotikojn, kaj plezure uzas ilin, sed ili rezonas kaj kondutas sub la influo de la samaj biblioj, homleĝoj, moralaj principoj kiel antaŭ du mil jaroj. Kia absurdo !... kaj jen oni genetike manipulas la naskadon, estigas fekundadon en tuboj, transplantas embriojn kaj akuŝigas maljunulinojn pli ol 60-jarajn, sed ne volas ke ino uzu sian uteron laŭ racia sinteno, ĉar estas la volo de Dio, kiu devas estri la mondon. Kiaj absurdaj kontrastoj, kiuj ja pereigos la homaron post tre mallonge!... Mi petas, ni bonvolu ne plendi, ni reagu tuj.


## La konsekvencoj de la eksplodo

Ne estas dubo, ke ĉiuj problemoj kaj mizeroj de nia homa socio estas rekte kunligitaj al la kvanto da homoj de tiu socio, ekde la migrado de la homoj de la kamparo al la urboj, kun la ekonomiaj, politikaj, sociaj konfliktoj, ĝis la ekologiaj fenomenoj de detruo. Pro la sama motivo antaŭ 50 jaroj eĉ ni "la naturamikoj", kiuj ŝatis ĝui la naturon, apenaŭ parolis pri poluado kaj la vorto ekologio ankoraŭ ne estis en la vortaroj, kio montras la gravecon kaj la rapidecon de la detrua procezo, kaj kiom urĝa estas nia racia, tuja interveno antaŭ ol estos tro malfrue. Bedaŭrinde la homoj, kiam ili vidas la problemojn, pretas barakti kontraŭ la efikoj de la mankoj kaj tute ne kontraŭ la kaŭzoj de la problemoj. Tion ni ekzemple vidis en la fama "Eko 92" en Rio de Janeiro, kie malofte oni parolis pri la "demografia eksplodo", sed kompense la femaloj dum pluraj tagoj parolaĉis pri sia "rajto" je naskado... tiel iradas la falsa ekologio.

## Preter la pesimismo.

Sendube ankoraŭ estas solvo, eĉ se ni (ĉiu el ni) bezonas ĉerpi el la tero proksimume 2000 kaloriojn ĉiutage por nia normala vivado. Per simpla kalkulo ni scias, ke ĉiu homo ankoraŭ "rajtas", disponas pri 17000 m² (1,7 ha) da kultivebla tero sur nia globo kaj ke ni kapablas produkti tiujn 2000 kal. en malpli ol 1000 m² , do ankaŭ eblas konservi sufiĉe da virga naturo por la ekologia ekvilibro de flaŭro kaj faŭno. La solvo kuŝas en simpla






konsciiĝo de tiuj faktoroj kaj apliko de konsekvencaj, raciaj sintenoj kaj kondutoj. Male al tio, kion skribis Bernard Golden en recenzo de mia libro "**Al la tero returne**" (Heroldo de Esperanto n°14 de 22 nov. 92), mi plene scias, ke la psikologiaj statoj kaj la kulturaj tradicioj de la homoj estas pli fortaj ol la homa racio mem, sed estas nia devo, ĝuste konduki (per eduko) tiujn homojn al eliro el la abismoj (ankaŭ psikologiaj kaj tradiciaj) por la alfronto de la realo.

En tiu realo staras la monstra, danĝera, demografia eksplodo. La solvo estas facila, kondiĉe ke la homoj forlasu la tradician obskurantismon, kie ili troviĝas. Nia destino ankoraŭ estas en niaj mensoj kaj manoj... preter la Dioj, kiujn ni mistike, idiote kreis !

***Edmundo***

*La grafikaĵoj de Garolo estas interesaj, sed nepre trosimpligaj, ĉar ili prezentas nur la suman loĝantaron de la tuta mondo. Sed tronaskado kaj malsato ne estas problemoj de la tuta mondo ; ili estas problemoj nur en kelkaj mondopartoj. Necesas paroli pri ĉiu regiono aparte.*

*Tamen se temas pri statistikaĵoj, mi prezentu kelk-*

*ajn : La supraĵo de nia planedo ampleksas proksimume 500 milionojn da kvadrataj kilometroj, kaj la monda loĝantaro proksimume 5 miliardojn da homoj. Averaĝe do, ĉirkaŭ 10 homoj loĝas en ĉiu kvadrata kilometro. Ie mi legis, ke nur 29% de la monda supraĵo estas seka tero, do ni ricevas la rezulton 33 homoj en kvadrata kilometro por la monda tero. Se oni elkalkulus Antarkton, kiu estas praktike neloĝebla kaj espereble baldaŭ ankaŭ jure neloĝenda krom por scienca esplorado, la rezulto estus 35.*

*Kompare kun tiu averaĝa nombro por la tuta mondo kelkaj regionoj estas multe pli dense loĝataj. Ofte oni nomas Honkongon kiel la plej dense loĝatan terpecon de la mondo. Honkongo ja estas tre dense loĝata kun iom pli ol 500 homoj en kvadrata kilometro, sed mi pensas, ke la Gaza strio havas ĉ. 1000 loĝantojn por ĉiu kvadrata kilometro. Tamen la nazioj, kiuj hodiaŭ okupadas tiun terpecon, donas homajn rajtojn al, kaj publikigas statistikojn pri, nur la eta juda parto de la loĝantaro, do estas malfacile esti preciza...*

*Belgujo havas 330 homojn por kvadrata kilometro. Britujo havas 230. Ĉinujo havas 110. Jen landoj, kiuj estas relative dense loĝataj.*

*Jen kelkaj landoj, kiuj estas relative maldense loĝataj : Usono, kun 27 homoj por kvadrata kilometro, kaj Brazilo, kun 19.*

*Klare oni ne povas fari rektan ligon inter la denso de loĝantaro kaj la problemoj, kiujn laŭdire kaŭzas la tronaskemo de triamondanoj. Kompreneble oni devus enkalkuli la kvaliton de la tero, ĝian agrokulturan uzeblecon, ne nur ĝian suman surfacon. Belgujo povas subteni 330 homojn por ĉiu kvadrata kilometro parte pro tio, ke ĝi konsistas el agrokulture tre valora tero. Grandaj partoj de Ĉinujo estas Gobio, la plej granda dezerto de la mondo. Necesus konsideri ankaŭ, ke eblas ŝanĝi la naturon. Antaŭ kelkaj jarcentoj la Britajn insulojn kovris densa praarbaro. Miaj antaŭuloj forbrulis ĝin por krei agrokulture uzeblan teron. (Ankaŭ por akiri brulaĵon, kompreneble). Eblas forigi praarbarojn ankaŭ en aliaj landoj...*



*Eble ekzistas geologiaj kialoj, kial Brazilo ne povas komforte subteni pli ol 20 homojn en kvadrata kilometro, dum multaj Eŭropaj landoj subtenas centojn da ili en luksego. Tamen ĝis oni klarigis al mi tiujn geologiajn kialojn, mi emas esti cinika : Ĉu eble la tuta konsterno pri demografiaj eksplodoj estas metodo de la riĉuloj por kulpigi la malriĉulojn mem pri ilia suferado, kiun vere kaŭzas koloniisma ekspluatado ? Mi esperas, ke triamondanoj estas sufiĉe inteligentaj por rekoni siajn verajn malamikojn.*

**J.G. :**

Sendube la "demografia eksplodo" estas unu el la plej gravaj problemoj de nia epoko. En la jaro 1950 la loĝantaro de la tero estis 2,5 miliardoj da homoj, nun pli ol 5 miliardoj. La fakuloj antaŭvidas 9 miliardojn en la j. 2025. La meza kreskado estas 2 % jare : malforta en la riĉaj landoj, tre forta en la malriĉaj.

Ekzemple :

| | **1985** | **2025** |
|---|---|---|
| CEE | 380 milionoj | 389 milionoj |
| Japanio | 121 milionoj | 129 |
| Norda Afriko | 124 | 275 |
| Nigra Afriko | 397 | 1227 |

Tiuj nombroj montras la malekvilibron, kiu minacas la mondon. La kialoj de tiu senbremsa kreskado de la loĝantaro en la "Tria Mondo" estas diversaj : malgrandiĝo de la infana mortokvanto, fakto ke la infanoj estas "kapitalo". Laborante tre junaj, ili alportas enspezojn al la familio (ĉefe en Orienta Azio). Ili estas ankaŭ garantio por la maljunaĝo de la gepatroj en tiuj landoj, kie ekzistas nenia socia protektado. La nombro de la infanoj estas ankaŭ signo de "vireco" por la viroj. Ankaŭ la religioj ludas rolon pro sia opono al la nasklimigo.

Ĉu ekzistas solvo por tiu problemo, kiu ŝajnas konduki rekte al katastrofo, ĉar la malsatuloj pli kaj pli multnombraj ne povos eterne kunekzisti paĉe kun la riĉaj malŝparantoj ? Nova ekvilibro devas esti trovata inter la kreskado de la vivrimedoj nepre limigata pro la ekologia protektado de la planedo kaj la ankaŭ necesa limigo de la kreskado de la loĝantaro en nia "finita mondo".

Kelkaj fakuloj pri demografio opinias, ke plialtiĝo de la vivnivelo de la malriĉaj landoj aŭtomate neprigas la malaltiĝon de la fekundeco. La donita ekzemplo estas Tajvano, kies naskoprocento malaltiĝis de 19,6 por milo en 1984 ĝis 15,9 por milo en 1986. Komparu kun Ĉinio, kiu malgraŭ la drasta planado ne sukcesis tute bremsi la kreskadon.

Alia rimedo proponata : la instruado de la filinoj, kiu donis interesajn rezultojn en kelkaj landoj, ekzemple en Srilanko. Tie la nombro da infanoj por virino falis de 5,9 en 1970 ĝis 3,7 en 1980 dank'al la instruado de la filinoj (64 % estas alfabetigitaj). En Burkina Faso okazis sama eksperimento kaj sendube ankaŭ en aliaj landoj.

Oni konstatas ankaŭ ke la filinoj de enmigrintaj virinoj forlasas la tradicion kaj la nombro de iliaj infanoj proksimiĝas al tiu de la lando, kie ili vivas.

Ŝajnas, ke necesas agi fronte al du problemoj : reekvilibrigi la riĉaĵojn inter la Nordo kaj la Sudo, sed ankaŭ konsciigi la malriĉajn landojn mem pri la demografia danĝero. La du agadoj okazu samtempe.

**Tereza :**

*Tiu ĉi temo tute kongruas kun elsendo de COUSTEAU, en kiu li grumblas kontraŭ troa altiĝo de naskiĝoj en la mondo. Fakte, de longe ankaŭ mi grumblis, kiam mi aŭdis tiajn stultaĵojn de demografoj, kiuj diris ke necesos pli kaj pli da homoj, por ke estu sufiĉe da laboristoj por subteni la plilongiĝon de la vivo, do de maljunuloj ne plu produktantaj, kaj pliprokrasto de eklaborado por la junuloj. Ĉiam mi pensis : Ja devas esti limo al tiu kurado al pli da naskiĝoj. Certe, oni konstatas, ke la altiĝo de la vivkondiĉoj havas samtempe influon al la nombro da infanoj. La riĉaj landoj havas do malpli da naskiĝoj. Tamen, kiel diras COUSTEAU, la malkreskado okazos, kiam estos jam tro da homoj, ĉar la pliboniĝo de vivkondiĉoj en la malriĉaj landoj ŝajnas malrapida. Cetere, kial do naski tiom da homoj, se oni ne donas al ili feliĉon kaj pacon, se oni grupigas ilin en gigantaj urboj foraj de naturo ?*

*Sed ĉu eblas transdoni tiun mesaĝon al la popoloj, kiuj kutime naskas kvanton da beboj por kompensi mortadon kaj havigi al si sufiĉe da brakoj por la nutrado de la familio? Esperu ni, ke instruado helpos por ŝanĝi la evoluon.*



**Suzanne :**

*Ludoviko komplete prezentis la problemon. Jes, la homa specio troege multiĝis (as). Tion iun homoj konscias. La homoj ne forgesu, ke la terriĉaĵoj havas limojn, des pli ke ili freneze malŝparegas ilin. Logike oni limigu la naskadon prefere ol multigi la mizerulojn.*

*Ja gratulindaj, laŭdindaj, imitindaj estas tiuj meritplenaj personoj, kiuj flegas sindoneme siajn samulojn. Sed tutcerte ne tiel solviĝos la problemo. Iuj organizoj klopodas por efektivaj kunlaboradoj ; iuj neregistaraj asocioj fakte laboras por egalecaj interkomunikoj pri scioj, teknikoj, krome de la helpado nun kaj tie ĉiam necesa kaj urĝa. Ĉu ni povas lasi virojn, virinojn, infanojn malsatmorti, pretekste ke iliaj "ĉefoj" sin interbuĉas ? Kompreneble, ne ! Do ne ĉio estu malaprobinda koncerne la homaman agadon. Sed la kreskanta praktiko "ĉio homama" estu kondamnata.*

*Oni starigu aliajn rilatojn : ekonomiajn, politikajn, sociajn. Eble estas pli facile diri kaj pli malfacile fari ol disdoni kilojn da rizo al la Somalianoj, sed estus la nura maniero kontraŭbatali la ekonomiajn logikojn produktantajn mizeron kaj militojn kaj la pravon de ekzisto de la homamaj agadoj.*

*La homama agado fariĝis modo, pli malbone... merkato. La homaman agadon profitas nur la potenculoj, eĉ se ĝi, jam nun, mildigas la suferojn de la koncernaj loĝantaroj.*

*Por kontraŭstari la homan solidareconla "homamo" fariĝis nova religio, oportuna artifika elturniĝo de tiuj, kiuj fakte rifuzas partigi siajn riĉaĵojn kaj ilin defendas per soldataro. La milito nun fariĝas "homama"...*

*La homamaj organizoj en la naskiĝanta kaoso ludis la rolon, kiun la misiistaj pastroj ludis, same kiel la komercistoj, en la deknaŭa jarcento en la afrikaj kaj aziaj merkatejoj : antaŭesploristoj alportintaj la civilizacion. Tuj kiam aperas la plej eta minaco, la ŝtatoj forsendas soldat-ekspedicion... Tre aktualaj agadoj...*

*Fari finon al la homama "business", plifortigi la iniciatojn por egaleca interhelpado, alkuniĝi la asociojn kiuj provas starigi egalecajn interkomunikojn, ne pere de la Ŝtato, estas la nura solvo.*

**Patriko :** *Kiu troas ? Se iu troas...*

*Se estas tro da homoj sur la tero, ĉu troas tiu plimulto kiu*

*nenion havas por manĝi, aŭ ĉu tiu malplimulto kiu rabglutas la pli grandan pecon de la fromaĝo ? Kial ne sterilígi la riĉulojn ?*

*Ĉu tiu demando pri tromultnombreco de homoj ne estas fantasmo kaj timego de privilegiaj voruloj pri la mizerego ilin ĉirkaŭanta kaj minacanta ?*

*Fakte ne estas tro da homoj, se konsideri la nutrivecon de nia planedo kaj ni eĉ vidos post tiu ĉi jarcento/milo, ke la tendenco maliĝos pro demografia reguliĝo rilate al ekonomiaj kaj kulturaj faktoroj.*

*La problemo (ĉar ĉiam nepre estu problemoj !?) ne kuŝas en kvanto sed ja en kvalito... ne en multnombreco sed ja en valoroj homaj kaj sociaj.*

*Do, kiel dirite : Ni kresku kaj multobliĝu!... Kaj for la abortistoj kaj ceteraj eŭtanaziistoj kiuj rememorigas min pri la Finsolvo de iu Adolfo!*

*********************************************************************

**Al Giovanni Barbieri**

I

Mian koron
inundas
ega ĉagreno
kaj la suspiro
fariĝas ploro.
Ho, kian doloron
donas al mi
foriro via
al la lando
de kiu neniu
revenas !
Iun tagon
mi venos al vi,
kaj ĉe via urno,
al vi flustrante,
eble sekiĝos larmoj
de miaj okuloj.

II

Mi timis
la tagon
de la adiaŭo.
Estis dorno
kruda kaj pikanta
kiu vundis
min
senlace.
Tiu tago
ne nur venis...
ankaŭ foriris,
ŝtelante
mian plej karan
amikon.

**Lina Gabrielli**





# VORTOJ DE MALJUNULO

valo

## EL MIA GALERIO DE PORTRETOJ

### III. Ivona

*En la feŭda epoko riĉaj nobeloj havis en sia kastelo galerion de pentritaj portretoj de prapatroj. En la dek-naŭa jarcento la invento de foto demokratigis tiun kutimon. Nun multaj modestaj domoj havas kolekton da familiaj portretoj. Jen la avo-frizisto kun bele tonditaj haroj kaj barbo ; jen la avo kuiristo kun tute razita vizaĝo sub la blanka kuiristĉapo, kun blanka antaŭtuko ; jen la avo lokomotivisto kun iom pendantaj lipharoj ; jen pli maljuna kun vangharoj. Jen pluraj virinoj diversaĝaj kun diversaj frizaĵoj kaj diversmodaj roboj.*

*En Florako ni havas grandformatan fotoportreton de juna ridetanta virino kun freŝa vizaĝo sub kasko el bukletaj haroj. Sur la dorsa flanko estas skribite : "BINGEN,oktobro 1923". Tiu portreto havas historion.*

*1904. Mi, kvarjara bubo, konatiĝas kun mia samaĝa kuzino Ivona. Ŝi estas blonda kiel sia bela patrino. Laŭlonge de ŝia spino pendas ora plektaĵo finiĝanta per nodo el blua rubando. Mi lude tiris ĝin kiel sonoriltirilon, kaj ŝi vigle reagis, ĉar ŝi ne multe aprecis tiun ludon.*

*1916. Kiam ni ambaŭ ekkonsciis pri nia reciproka amo, ŝi estis ankoraŭ blonda, sed ŝiaj haroj komencis malpli heliĝi.*

*1922. Kiam ni oficiale gefianĉiĝis, ŝi estis jam preskaŭ bruna. Ŝiaj longaj haroj pendis larĝe kaj dense sur la dorso ĝis la talio. Aŭ ŝi aranĝis ilin en du simetriaj plektaĵoj, kiuj plaĉe enkadrigis ŝian vizaĝon kaj pendis sur la brusto ; aŭ ŝi tordis ilin en hartubero sur la verto kaj la okcipito. En tiuj tri aranĝoj mi trovis ŝin bela.*

*Tiam furoris la modo pri mallongaj haroj. Komence ĝi es-*

tis simbola manifesto de emancipiĝantaj junaj virinoj, kiujn oni nomis infraŭloj laŭ fama romano de Victor MARGUERITTE (**La Garçonne**). Sed baldaŭ ĝi tiom disvastiĝis, ke ĝi fariĝis nur modo. Ĝi invadis tutan okcidenton. En la revuo **Esperanto** aperis tutpaĝa artikolo titolita : la paĝia harfrizaĵo. Ĉe la Verda Kato Margarineta kantis esperantan version de kanzono de Mistinguett :

"Ŝi tranĉis, siajn harojn for,
Kiel knabineto
Koketa.
Ŝi tranĉis siajn harojn for
Kaj aspektis nun kiel sinjor'..."

La modo atingis urbetojn kiel Florako. Ivona ekdeziris adopti ĝin kaj parolis al sia patrino. Tiu ĉi singardeme respondis : "Petu permeson de cia patro."

La patro senhezite respondis per nur unu vorto : " - Ne!"
- Sed ankaŭ Rajmundo dezirus tion...
- Rajmundo, kiam li estos cia edzo, decidos, kaj ci obeos. Ĝis tiam la mastro ĉi tie estas mi kaj mi rifuzas, ke ci mallongigu ciajn belajn harojn! "

Tia estis la patriarka tradicio en Cevenoj : mastro estas la patro, poste la edzo, ĉiam la viro.

Tamen en tiu tempo virino kiel viro estis leĝe matura ekde la dudek-unua jaro (nun la dek-oka). Do Ivona dudek-du jara rajtis memstare decidi kaj agi pri si. Sed ŝi tre amis sian patron kaj ne volis ĉagreni aŭ malkontentigi lin.

1923. En septembro ni geedziĝis. En oktobro ni trajne veturis al nia novgeedza hejmo en Bingen ĉe Rejno, tie ĝuste, kie la riverego enfluas en la plej belan parton de sia fama valo.

Mi ne plu parolis pri la haroj, sed Ivona havis sekvon en la ideoj. Apenaŭ instalite ŝi vizitis friziston, kaj la belaj longaj haroj falis sub la tondilo. Poste la artisto aranĝis belan bukletan harfrizaĵon. Senprokraste ŝi iris al fotisto kaj revenis kun kelkaj malgrandformataj fotoj por legitimkarto. Ŝi tuj sendis unu al la gepatroj kun la vortoj : "Nu, kia vi trovas tiun ĉi kapon ?"

La patro ne ekkoleris, male li estis ravita, kaj li tuj mendis grandformatan reprodukton sen retuŝo de la malgranda bildo. Ĝi estis konservita en la gepatra hejmo, kiu estas nun la kampardomo, kie ĉiujare kunvenas la tuta familio.



Nun mi sola povas rekoni la originalon de tiu portreto. Sed niaj geidoj ŝatas ĝin, ĉar ili scias, ke tiel aspektis antaŭ preskaŭ sepdek jaroj la blankharulino, kiun ili amas.

Mi imagas, ke post kelke da jaroj nia blonda pranepeto Francisko, nun sesjara, montros ĝin al sia bruna kuzineto Maria, nun okmonata, kaj klarigos al ŝi, ke tia estis antaŭ longa tempo la kara "mami" Ivona.

*********************************************

## EVENTO EN FRANCLINGVIO

Fine ĝi aperis. Ĝi ? Nome la "**Grand Dictionnaire Français-Esperanto**" (Granda Vortaro Franca - Esperanta). Tiun ni longe atendis.

De post la bonegaj vortaroj de GROSJEAN-MAUPIN pasis longa tempo. La lingvo evoluis, ĝia vorttrezoro multe pli riĉiĝis. Ni urĝe bezonis modernan vortaron. Jen ĝi estas : dika volumo, pli ol 900 paĝoj, bele presita sur glata papero, bele prezentita en fortika bindaĵo. Ĉu la enhavo estas inda je tiu belaspekta vesto ? Ne atendu de mi recenzon : ĝi necesigus kompetenton kiu mankas al mi, kaj detalan esploradon, kiu daŭrus longatempe. Mi nur trafoliumis la libron, kaj de tiu supraĵa rigardo mi ricevis bonan impreson. La vortaro ŝajnas al mi riĉenhava, bone konstruita, facile utiligebla.

Eble iom multekosta, sed ĝi certe valoras la koston. Mi opinias, ke devus ĝin akiri ĉiu franclingva esperantisto deziranta progresi en scio kaj praktiko de la lingvo.

La franclingva literaturo de pluraj jarcentoj estas tre riĉa kaj ĉiujare aperas kelkaj bonaj libroj. Vi jam ekvidas al kio mi celas. Se ĉiu franclingva esperantisto kapabla por traduki, helpe de la Granda Vortaro, elektus unu verkon tradukendan kaj sin jungus al la tasko... Sendube la nunaj cirkonstancoj ne estas favoraj al grandskalaj eldonoj. Sed ni devas esperi pli oportunan tempon. Se estos multaj manuskriptoj pretaj por eldono, tiam baldaŭ pliriĉiĝos la biblioteko de la internacia muzeo en Vieno kaj la libroŝrankoj de multaj esperantistoj en la mondo.

Do vi, kapabluloj ne prokrastu ! Ek al laboro ! Tenu la grandan vortaron ne staranta kiel ornamo sur breto de libroŝranko sed kuŝanta sur skribotablo, proksime de la manoj kaj de la okuloj.

**VALO.**

ALDONENDAJ ESPRIMOJ ( kompilis : Lucien BOURGOIS )

donner à penser : pensigi

donner à rire : ridigi

donner de la voix : laŭtigi la voĉon

donner faim : malsatigi

donner la mort : mortigi

834 ( donner l'eau à la bouche ) - ajouter : venigi ( al iu ) akvon en la buŝon

845 : voir 1.812

847 ( donner libre cours à sa colère ) - ajouter : malbridi sian koleron

donner lieu à ... : okazigi, naski

donner raison : pravigi

donner suite : havigi sekvon

859 ( se donner un mal du diable )- ajouter : strebegi

donner un pois pour avoir une fève : doni ovon por ricevi bovon Z

861 ( dormir à la belle étoile ) - ajouter : / sub stelĉielo

862 ( dormir à poings fermés ) - ajouter : pop. en écraser

864 ( dormir d'un soleil de plomb ) - ajouter : dormi kiel ŝtono Z

874 : voir 363

en douceur : kviete

891 ( dur de la feuille ) - faire précéder de "pop." -
ajouter : / dur d'oreille : duonsurda

eau de table ( une ) : trinkakvo

894 ( l'échapper belle ) - ajouter : elsaviĝi
- vous l'avez échappé belle ! : prosperis al vi elsaviĝi !

898 ( en un éclair ) - ajouter : kun la rapideco de fulmo Z - voir 454 et 463

écraser une larme : viŝi larmon

effet de ... ( faire l' ) : impresi kiel

effet du hasard ( sous l' ) : laŭ la volo de la okazo Z

égalité ( à ) : voir 2.391

embrasser du regard : ĉirkaŭrigardi, ĉirkaŭpreni per rigardo B

933 ( ne pouvoir s'empêcher de rire : ne povi sin deteni de l'rido ( HODLER )
- aucun linguiste sérieux de pourra s'empêcher de rire :
ne unu serioza lingvisto malhelpos al si ridon ( T. CART )

934 ( empêcheur de tourner ( danser ) en rond - ajouter : neoportuna ĝenanto/ĝenulo

940 : voir 662

943 ( un enfant de l'amour - ajouter : / une enfant naturel.
remplacer "eksteredza" par : eksteredzeca ( neleĝa )

947 ( s'enfoncer dans le crâne - ajouter : encerbigi

950 ( enfourcher son dada ) - ajouter : ekveturi sur la plej amata ĉevaleto Z

engager le combat : komenci batalon

entrer en guerre : enmilitiĝi

entrer en scène : eniri sur la scenejon



POR NIAJ INFANOJ

*Gudrun Pausewang*

## KARA DIO DE L' RIĈULOJ

*En Sud-Ameriko estas multaj povraj kaj nur malmultaj riĉaj. Tiel estas ankaŭ en urbo San Vicente. La riĉuloj loĝas en kvartalo El Sol, tio signifas "la suno". En ĉi kvartalo staras la plej majestaj vilaoj, kaj ĉiu vilao troviĝas en ĝardeno plena de belaspektaj florbedoj. La laboron en la vilaoj plenumas servistinoj, la ĝardenojn flegas ĝardenistoj, kuiristoj kuiras la manĝon por la riĉuloj, kaj kelkaj riĉuloj havas eĉ ŝoforon.*

*La kuiristoj, servistinoj, ĝardenistoj kaj ŝoforoj hejmas en la naŭ kvartaloj de la povraj. Tie estas nek vilaoj nek florĝardenoj. Tie loĝas familioj kun multaj infanoj kune kun la gepatroj kaj pliaj parencoj en etaj kabanoj sen fluanta akvo kaj sen tualetejoj. Tie la vojoj ne estas asfaltitaj. La infanoj ludas en la flakoj de poluakvo kaj en la ŝlimo de la lasta pluvo. La pli junaj infanoj vagas nudaj. La gepatroj havas apenaŭ sufiĉe da mono por aĉeti vestojn por la pli oldaj. Multaj eĉ ne havas sufiĉe por satigi la familion. Kaj la plej multaj povruloj, egale ĉu infanoj aŭ plenkreskintoj, ne povis frekventi lernejon, ĉar ne ekzistas sufiĉe da lernejoj en la povrulaj kvartaloj, kaj pro tio, ke oni devas pagi la librojn kaj kajerojn por la instruhoroj.*

*Estas preĝejoj ankaŭ en la povrulaj kvartaloj - etaj mizeraj preĝejoj, en kiuj la multaj povraj ne ĉiuj trovas lokon. Kaj la pastro ne povas helpi al ili rilate ilian mizeron. Se ĉiu familio posedus almenaŭ peceton da lando, por povi kultivi maizon kaj terpomojn kaj legomon kaj por povi teni kelkajn kokinojn... Sed la plej multa lando apartenas al la riĉuloj. Kaj ne estas sufiĉe da laborlokoj por ĉiuj ĉi povraj volantaj perlabori monon por povi protekti siajn familiojn de ĉi mizero.*

*La preĝejo de El Sol male estas impresa konstruaĵo, kiu superas la vilaojn kaj jam de tre fore videblas. Ĝi havas marmoran plankon kaj marmorajn kolonojn kaj egajn buntajn vitrofenestrojn ornamitajn*

*per bildoj, kaj la turo estas la plej alta en la tuta urbo San Vicente. Multaj turistoj rigardas la preĝejon, ĉar ĝi famas tiel. Kaj tiam ili iras tra la kvartalo El Sol kaj diras unu al la alia : "Kiel belega, kiel pura kaj riĉa tiu ĉi urbo estas !"*

*Sed neniu diras al ili, ke ili devas rigardi ankaŭ la povrulajn kvartalojn, se ili volas konatiĝi kun la urbo. Multaj el ili teruriĝus vidante la tiean mizeron. Ne, tion la plej multaj turistoj tute ne volas rigardi.*

*"La povreco malĝojigas tiom", ili diras. "Dank'al dio ni ne povras. Kaj se ni vojaĝas, jen ni volas gaji."*

*Dimanĉe la riĉuloj torentas el kvartalo El Sol en sian preĝejon. Ili alveturas en grandaj aŭtomobiloj kaj portas multekostan ornamon por montri kiel riĉaj ili estas.*

*La povraj ne vizitas tiun preĝejon. Ili scias, ke ili ne volonte estas vidataj tie, kaj ankaŭ ne sentas sin bone inter la riĉuloj. Sed sur la preĝejŝtupoj atendas la plej povraj, la almozuloj, kiuj eĉ kabanon en povrula kvartalo ne havas, sed dormas ie sur domŝtuparo aŭ sur parkbenkoj. Se la diservo finiĝis, ili etendas manojn kaj almozpetas la riĉulojn. Tiam ili ricevas kelkajn monerojn kaj forkuras kontente por aĉeti manĝon. Ili perdis ĉiun esperon, ke ilia vivo povus ŝanĝiĝi iam. Ili ne povas imagi posedi iam etan domon kaj tiom da mono, ke ili pure povus vesti sin kaj senprobleme manĝi trifoje potage.*

*Sed la infanoj ankoraŭ ne mallernis esperi kaj revi. Kaj tiel iudimanĉe du malgrandaj knaboj meze de la diservo envenas la preĝejon de la riĉuloj : la portalo estis ja malfermita, kaj tiel ili devote kaŝeniris, sur la piedpintoj kompreneble. Sed oni ja tamen ne estus aŭdinta iliajn paŝojn, ĉar ili ja estas senŝuaj. Ili terure kotas, havas hirtajn harojn kaj portas nenion krom ĉifonitaj pantalonoj. La pli olda el ili portas sur la dorso plastan sakon. En ĝi troviĝas ŝimiĝinta bulko kaj kelkaj sekiĝintaj blan-*



*kaj panaĵoj, tri fridaj ŝelkuiritaj terpomoj kaj peceto da fromaĝo prironĝita de musoj. Ĉion ĉi ambaŭ knaboj mane elfosis el la rubujoj de El Sol : ilia dimanĉa manĝo.*

*La preĝejservisto alkuras kaj intencas elpeli la knabojn ĝuste piedantajn tra la mezirejo en la direkto al la altaro. Ili fetoras. Kelkaj damoj ĵetas indignajn rigardojn al ili kaj levas la nazojn. "For vi", flustras la preĝejservisto. "Kion vi serĉas ĉi tie ? Iru en vian preĝejon, tien kie via loko estas!" "Sed ni volas peti vian dion pri io", flustras la pli olda, kiu havas ĉirkaŭ naŭ jarojn. Precize eĉ li ne scias sian aĝon. "Ni jam estis ĉi tie, antaŭ kelkaj tagoj, kiam la preĝejo senhomis, sed tiam via dio ŝajne ne ĉeestis. Ĉiukaze li ne aŭdis nin, ĉar okazis nenio ĝis hodiaŭ. Tial ni venas plian fojon, kiam vi ĉiuj kolektiĝis ĉi tie. Ĉar li nun certe ĉeestas, pro vi, kaj devas aŭskulti nin."*
*"Fino al la babilaĉo", siblas la preĝejservisto, starigante sin kun etenditaj brakoj antaŭ ili kaj barante la vojon al la altaro kontraŭ ili. Sed ili lertas kaj spertas, ili lernis preterhasti policistojn, kaj servistinojn kun la komisio forpeli rubujfosulojn. Ili delasas la manojn reciproke kaj preterglitas dekstre kaj maldekstre la preĝejserviston, kuras al la altaro, kie ili denove trovas sin per la manoj. Kaj antaŭ ol la preĝejservisto povas venki sian konsterniĝon, la pli olda vokas al la kruco super la altaro : "Kara dio de l' riĉuloj, donacu al ni riĉajn gepatrojn, tiajn, kiaj loĝas en El Sol ! Ĉar ni havis nur patrinon, kaj tiu estas morta. Bonvolu ! Ni donacos al vi ĉion, kion ni havas ĉi tie en nia sako. Estis bona tago hodiaŭ, ni trovis multon hodiaŭ matene. Ni ankoraŭ ne manĝis ion de ĝi, por ke vi komprenu, ke ni seriozas pri tio."*
*Kaj li suprenkuras la ŝtupojn, rektiĝas kaj svingas sian sakon de la dorso sur la altaron.*
*"Kaj por ke vi sciu", li aldonas, "hodiaŭ ni tute ne manĝis ion ĝis nun."*

*Kelkaj damoj en la unua vico ekkrias terurite. La*

altarknaboj retroevitas, la pastro ĉesigas la legadon kaj gapas konfuzite la kotan sakon kuŝantan antaŭ li sur la altaro, sur la neĝe blanka brodita kovrilo, inter lilioj kaj kandeloj.

En ĉi momento la preĝejservisto atingas la knabon, fermtenas lian buŝon, ŝirtiras lin for de la ŝtupoj kaj ŝovas lin antaŭ si tra la longa mezirejo ĝis la portalo. La pli juna frato poststumblas ilin kaj plorsingultas : "Kara dio de l' riĉuloj, ja helpu nin !"

Li krias tion ju pli laŭte des pli ili proksimiĝas la portalon. La pli olda barakte defendas sin, li eĉ mordas la fingrojn de la preĝejservisto. Sed helpas nenio, la preĝejservisto pli fortas. La pli juna krias kaj krias. Liaj larmoj fluas sur liaj kotaj vangoj, la nazo gutas. Sed li ja ne havas naztukon. Ĝuste antaŭ la portalo la pli olda deŝiras la manon de la preĝejservisto for de sia buŝo kaj vokas : "Li ja hodiaŭ denove ne ĉeestas ! Pablito, finu krii, li ne ĉeestas !" La homoj en la benkoj algapas la infanojn. Ili koleras. Kia tumulto en la preĝejo, kia ĝenanta kaj molesta interrompo de la Sankta Meso ! La pastro silentas ankoraŭ kaj atendas. Li sulkigas la frunton. Sed nun finfine la preĝejservisto sukcesas elŝovi la du ĝenulojn kaj peli ilin malsupren sur la preĝejŝtupoj, dank'al dio. Li fermas la portalon. Nun ili ree estas inter si, la riĉuloj. Post la diservo ili decidas, ke estontece gardisto staru antaŭ la portalo, kiu tute ne plu enlasos almozpetantajn infanojn, ja, neniujn povrajn plu.

tradukis **HH**.

*Et sia 60-jara aktiveco, - li esperantiĝis en 1931 - **Lentaigne** rakontas pri du plaĉaj eventetoj.*



# Esperanto-Semajno, 1945
## en Balaruc les Bains (sude de Francio)

Post aŭgusto 1944, Sudo de Francio estis "liberigita" kaj la Germanoj retretis norden. Ekde tiam ni povis aŭguri pri pli bela estonteco.

Dum la milit-periodo (de 1941 ĝis 1944), mi instruis Esperanton per korespondado al kelkaj amikoj de mia suda regiono, kaj mi planis por ili komunan renkontiĝon komence de aŭgusto 1945, en Balaruc les Bains.

Tiucele mi aperigis anonceton en la tiama bulteno de SAT-Amikaro.

Sed la Parizanoj vidis en tiu anonco belan okazon por partopreni en poresperanta arango, des pli ke ili povis ĉeesti neniun internacian kongreson.

Mi provis persvadi ilin, ke mi absolute ne povos gastigi ilin, tiom same por loĝado, kiom por nutrado. Mi substrekis, ke la anonco celas nur "la Sudanojn". Sed ili tiom insistis, ke mi devis finfine akcepti.

Se mi esceptas la fakton, ke mi luis nur kelkajn ĉambrojn en mia malgranda vilaĝo (700 loĝantoj), mi devis trovi solvon por ĉirkaŭ dudek personoj. Mi decidis transformi mian klasĉambron en amasloĝejon, kun pajlo sterne sur la planko. Sed kiam mi min turnis al kamparana amiko, por ke li pruntu al mi pajlon, li veis, ke li mem ne havas da ĝi por nutri sian ĉevalon !

Restis unu solvo : kolekti kaj amasigi **zosteron*** (herbo kreskanta en lago Thau, kaj uzata de kelkaj por fari matracojn).

Do ĉiutage, fine de julio, helpe de biciklo-remorko, ni amasigis zosteron en la korto de la lernejo, lavis ĝin por sensaligo, kaj sekigis ĝin kvazaŭ temus pri fojno ! "Ni" signifas Suzanne Lentaigne, Leo Lentaigne kaj Hélène Bernard (-Gente), kiu tiam spertis la Freinet-metodon, en niaj klasoj.

Koncerne la nutraĵon, ĉiu estis komisiita alporti siajn "varkuponojn" por akiri panon, oleon, ktp. Feliĉe mi sukcesis ri-

----

* **zostero** : vidu P.I.V.

*cevi de la tiama "Jeunesse et Sports" - Junularo kaj Sportoj - (mi ne memoras la ĝustan nomon) eblecon akiri kontentigan kvanton da nudeloj.*

*La staĝanoj pasigis idealan semajnon. La vetero estis belega, eĉ varmega. Sed estis tiel facile sin bani en la lago! La "konversacia parto" foje disvolviĝis por kelkaj, kun la poŝtaĵo en la akvo.*

*La manĝojn ni preparis komune sub la ŝirm-korto de la lernejo. Sed kio havis grandan sukceson, tio estis 80-litra barelo da vino, kiun mi metis je ĉies dispono ; ĉar por multaj vino estis raraĵo dum pluraj jaroj de germana okupacio.*

*Pri la amas-loĝejo, sternita de maldika tavolo de zosteroj, neniu plendis, eĉ se la ploroj de bebo de juna paro perturbis la dormon, aŭ se lia ĉambropoto malbone odoris !*

*Pri la programo, mi menciu la aparte interesan prelegon de Petro JAYER, kiu ĵus revenis el infero, nome la Mathausen-koncentrejo* .*

*Ĉio iris glate. Kiam okazis la disiĝo, ĉiu esperis revidi unu la alian en 1946. Efektive mi organizis duan "semajnon" laŭ samaj kondiĉoj.*

*Tamen, kiam en 1993 mi retro-pensas pri tio, mi iom tremas, ke mi organizis ĉion tion ĉi sen iu "oficiala" permeso. Kian respondecon mi prenis sur min !*

*Sed en tiu periodo kvazaŭ revolucia, ŝajnis al mi, ke ĉio estas tute nature permesita.*

*Ne okazis 3-a esperantista semajno. La sopiro de multaj estis partopreni en la unua post-milita kongreso en Aarhus.*

***

## SAT-Kongreso en Aarhus (Danio), 1947

*La parizaj SAT-anoj okupiĝis pri la vojaĝo. Malmulte veturis ŝipe al Aarhus. Plej multe elektis peraŭtobusan iradon. Kompari nian veturadon al la nuna Paris-Dakar estus kompreneble troigi. Tamen...*

------

* *Pri tio oni legu en "**40 paŝetoj al plua posedo**", eldonita de SAT-Broŝurservo.*



*Niuj du aŭtobusoj estis kadukaj, datiĝantaj de antaŭ la milito, ne komfortaj kaj pretaj panei laŭvice. Tiel okazis. Sed, feliĉe, ili ne paneis samtempe, sed se unu el ili devis halti, la alia kompreneble atendis. Oni povas imagi la neelteneblan prokraston, kiun suferis la homoj (gastigantoj), kiuj atendis nin jen en Maastrich, jen alie, kaj kiel acide tio efikis sur la karakteroj de la vojaĝantoj!... Krom ĉe grupo de ok junaj personoj. Por partopreni la distran parton de la kongreso ili antaŭe preparis dancojn, el inter ili "kvadrilon de Lancistoj". Dum tiuj haltoj ili profitis por ripeti sur la vojo mem kaj poluri sian spektaklan prezentaĵon.*

*Pro la terura postmilita situacio en Germanio, ne eblis al ni disponi iun ajn valuton, kiu ebligus aŭ gasti en hotelo aŭ aĉeti plej etan panpecon. Nepre necesis transiri de Nederlando al Danio en la daŭro de unu tago, senhalte.*

*Senhalte ? Jes ! Tamen ni renkontis germanajn SAT-anojn, ekzemple en Bremen. Al ili ni donacis pakaĵojn de nutraĵo, pretigitajn de ni en Parizo.*

*Granda surprizo atendis nin en Hamburgo. Imagu, ke la estro de la tiea polico estis Weide, bone konata esperantisto, kaj socialisto. En la policejo mem oni regalis nin per supo ne tre densa, sed kiu varmigis samtempe kaj la korpojn kaj la korojn.*

*Ni adiaŭis lin kaj liajn subulojn per sincera kanto de "La Internacio".*

*Ni atingis Danion nokte. Danio ! Kia kontrasto ne nur kun Germanio kompreneble, sed ankaŭ kun Francio, kvazaŭ tiu lando ne suferis pro la milito.*

*Mi komprenas nun kial oni elektis tiun landon por la 20-a kongreso, kvankam okazis tie la 19-a en 1939 en Kopenhago.*

*La franca registaro draste limigis la eblecon disponi kontentigan nombron da danaj kronoj, apenaŭ sufiĉaj por pagi la gastigadon en hotelo kaj la nutraĵon. Domaĝe ! Ĉar kiel allogaj estis la dikaj glaciaĵoj, kiujn oni povus, tamen povis frandi!*

*Pardonu min, ke mi retrospektive aludas pri detalo. Sed regali sian palaton post kvinjara drasta epoko, ne estis tiam detalo !*

*La saman miron kaj admiron ni spertis, kiam dum la kongreso ni eniris la grandan salonon, kie la urbestro invitis la*

*620 kongresanojn por memorinda lunco.*

*Pri la kongreso mem, ĉu necesas mencii, ke la etoso estis pli ol kamaradeca, ĝi estis frateca, amika ; kio estas komprenebla post 5-jara silento.*

*Venis la horo de disiĝo kaj de la foriro. Tio okazis sabate posttagmeze. Mi pensis, ke verŝajne ni traveturos Germanion nokte, kaj imagis ke la reveno estos tiel peniga kiel la irvojaĝo. Kiam ni atingis Hamburgon, ni denove haltis en la policejo. Ni ne sciis, ke Glodino, la organizantino de la vojaĝo, kaj k-do Weide jam antaŭe komplote decidis, ke ni tranoktos... en la policejo mem ! Kial la litoj de la policanoj estis tiam liberaj ? Mi ne scias ; eble ĉar estis sabate. Sed estis tiel ! Ĉu vi imagas la impresojn, ĉefe de la virinoj, dormantaj en lito de policano, kun - ĉe la kapo de la lito - rako da fusiloj.*

*Sekvantan tagon, - do dimanĉe matene - unu el la ŝoforoj konstatas, ke lia motoro kalcitras ! Temis, laŭ li, pri grava paneo. Jam ! Vere jen malagrabla aŭguro.*

*Kiel elturniĝi por saviĝi el la situacio ? Ni troviĝis en la "brita zono". Feliĉe en nia grupo partoprenis la anglo Sulsky. Verŝajne li iris al la stabejo de la anglaj okupaciantoj. La rezulto estis, ke post eble du horoj ni povis adiaŭi k-don Weide kaj entrepreni la revenvojaĝon...*

***L. Lentaigne***

************************************************************

**ICEM-ESPERANTO** (Kooperativa Instituto de la Moderna Lernejo Freinet-pedagogio) invitas vin partopreni en ĝia renkonto en PARDUBICE (Ĉeĥio) de la 14a ĝis la 23a de julio 1993.

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon. Interesatoj de ekssocialismaj landoj al : Jarmila RÝZNAROVÁ
na okrouhlíku 953/21, ČR 53003 PARDUBICE, Ĉeĥio
- de aliaj landoj al : Daniel DAVID
44 rue de Lens, F 59190 HAZEBROUCK, Francio



# PENSI ESTONTECON

*En la universo evoluas ĉio : la astroj, la planedoj, la vivantaj estaĵoj, la homoj kompreneble. Kial ekonomio kaj politiko ne evoluus ? Ĉar la pasinteco estas for, la nuntempo estas jam determinita de la pasinteco, ni do povas agi nur sur la estonteco. Ni povas agi sur la estonteco, nur se ni pripensas ĝin, kritikas la nunon kaj analizas la eblojn estontajn. Kompreneble, ni ne estas divenistoj, ni ne ĉion povas antaŭvidi. Sed ni kapablas tamen ekstrapoli, prognozi, elekti inter diversaj vojoj, programi kion ni dezirus, kaj la vojon por trafi la celon.*

***LA NUNA SITUACIO***

***Pri ekonomio :***

*Estas grava ekonomia krizo en la mondo. En Okcidento per la novaj produktmetodoj kaj -rimedoj ni povas facile produkti pli ol ni bezonas ĝenerale, estas epoko de abundo, eĉ de riĉa abundo. Bedaŭrinde, pro mismastrumado de ekonomio estas senlaboruloj po milionoj, t.s. milionoj da malriĉuloj, da mizeruloj. Samtempe, malmulte da riĉuloj fariĝas pli kaj pli riĉaj. Inter tiuj du klasoj estas ja milionoj da mezklasanoj, kiuj perlaboras salajrojn pli-malpli decajn. Sed tiu lasta klaso malkreskas laŭ la kreskado de senlaboreco. Necesas redukti iliajn enspezojn por ebligi vivon al la malfeliĉuloj, kiuj ne plu havas laboron. Konsekvence, ili malpliigas siajn elspezojn, sian konsumadon, do kreskas la senlaboreco. Des pli ke pro la konkurenco la kultivoj kaj la industrioj pli kaj pli migras al la Tria Mondo... Tie estas popoloj, kiuj eliĝas el primitivaj vivkondiĉoj kaj tial akceptas tre malaltajn salajrojn. Ĝenerale, ili troviĝas en tropika mondo, ili havas malpli da elspezoj por varmiĝi, vestiĝi, ktp. En la tuta sudorienta Azio estas tiel. La Japanoj, kaj aliaj, kreas fabrikojn, entreprenojn kun kelkaj inĝenieroj malpli pagataj ol la okcidentaj samranguloj, kaj la laboristoj ricevas mizerajn salajrojn, per kiuj neniu okcidentano povus vivi. En Afriko estas pli primitivaj vivkondiĉoj, sed pro po-*

litika malstabileco kaj ofte ruiniĝo de la lando post la malkoloniado, la kapitalistoj hezitas. De post 1960 la plej multaj el la afrikaj landoj forte regresis, la Azianoj estas ĝenerale multe pli evoluintaj. En Afriko foje la registaro tute malaperis, la funkciuloj ne plu laboras, ili estas okupataj en fruktodonaj ŝakradoj. La plej kleraj kaj honestaj jam formigris aŭ laboras en internaciaj organizoj, kiuj pli bone pagas.

Aldonu, ke mono estas objekto de spekulacio tutmonde. Iaj monoj havas internacian valoron determinatan en la borsoj ! Aliaj havas nur lokan valoron, tie oni uzas internaciajn valutojn por internacia komerco. Per tio, kion ili vendas ekstere, ili akiras internaciajn valutojn, aliel ili devas mem vivteni sin. Ĉiel estas malmultaj klientoj por la varoj produktataj en riĉaj landoj.

Tial en Okcidento oni troe produktas varojn nevendeblajn ekstere kaj eĉ interne, ĉar multaj havas tre malgrandan aŭ tute ne aĉetkapablon. Ekzemple, pro la G.A.T.T.-akordoj la Usona Imperio trudas gravajn damaĝojn al agrokulturo en Eŭropo, ĉefe en Francio. En tiu lasta lando dum la 6 venontaj jaroj duono el la kamparanoj devos malaperi. La dramo estas des pli akra, ke la plejmulto el tiuj kultivistoj estas posedantoj de la bienoj kaj iloj. Iuj havas multe da ŝuldoj. Se temus pri ŝtatentreprenoj, la ŝtato zorgus por ordigi la aferon, sed ili estas nur individuoj.

Kompreneble, tiu situacio ne povos ĉiam daŭri, iam la tuta ekonomio blokiĝos, kiam estos tro multe da mizeraj senlaboruloj. Kompreneble, ne estas la riĉuloj, kiuj povas akiri la varojn : estas tro da varoj por tro malmultaj riĉuloj. Tion antaŭvidis Karlo Markso, sed nun tio akceliĝas pro la grandegaj progresoj sciencaj kaj teknikaj. Aliu antaŭvidis tiun situacion tre klare ekde la jaroj 20-aj : J. DUBOIN, kiu kreis la abundanan movadon, kaj kies filino kun skipo daŭrigas la verkon.

Nun la usona kapitalismo triumfas kaj certe havas plurajn jarojn antaŭ si, ĉar ĝi estas ĉiam fortika.



Pro tio, ke ĝi estas la plej granda kapitalisma potenco, nepre necesas, ke kapitalismo fiasku unue en Usono, ĉar ĝi batalis -as -os kontraŭ ĉiu alia formo de ekonomio. Aliel oni povus facile starigi socialismon en Eŭropo.

**Pri politiko kaj demokratio :**

Post la trafa artikolo de H. Castiau en L! 102 ni ĉiuj povas konstati, ke demokratio ne plu bone funkcias. Tia estas ja evoluo. En iaj kazoj la institucioj pliboniĝas, en aliaj kazoj ili malboniĝas. Ĉiu problemo havas solvon, necesas serĉi la plej taŭgan. Mi ofte pripensis la problemon. Mi spertis ankaŭ, ke en la francaj kolonioj antaŭe ne estis baloto, la tuta registaro konsistis el ŝtatfunkciuloj, kaj tio funkciis bone. Tio havas plurajn avantaĝojn. Por iĝi ĉefo de ia sekcio aŭ fako administra aŭ teknika, ne sufiĉis havi diplomojn, necesis sekvi karieron. Oni komencas per unu jaro da provtempo antaŭ ol esti titolulo, poste oni supreniras la diversajn gradojn. Ne ĉiu atingas la superajn gradojn : nur la plej kapablaj, ne temas pri aparteno al iu partio aŭ religio. Por la ne tute kapablaj oficistoj estas t.n. garaĝvojoj. Ĉiujare la funkciuloj estas notataj de siaj ĉefoj, sed la notoj estas ankaŭ ekzamenataj de komisiono, en kiu samranguloj estas reprezentataj. En kazo de konflikto kun la ĉefoj, la funkciulo povas peti alian postenon. Kompreneble, kiam funkciulo eraras, estas diversaj punoj, de simpla mallaŭdo, malfruo en la rangaltiĝo, kaj en gravaj kazoj (ŝtelo de kasmono, ktp) li povas esti juĝata de tribunalo kiel iu ajn civitano. Tiel la funkciulo havas intereson, ke lia tasko estu bone plenumata. Lasta avantaĝo : kiam li rajtas emeritiĝon, li nepre emeritiĝas. Deputito respondecas antaŭ neniu, li promesas ĉion ajn al la voĉdonontoj, kaj senskrupule faras la malon. Ofte li restas en sia posteno ĝis tre maljuna aĝo : Mitterrand 76-jara, Houphouët-Boigny 85, ktp. Ni ĉiuj scias, ke post la 70-a jaro la fortikeco, la vigleco de homo rapide malkreskas.

Restus tamen trovenda solvo, por ke tio ne fariĝu

*diktaturo : speciala jura komisiono, referendumo, ktp... Tio estas serĉenda. La civitanoj rajtas pere de asocioj : sindikatoj, kooperativoj, unuiĝoj de konsumantoj, gazetaro, ktp., sciigi siajn opiniojn kaj dezirojn. Povas esti akordigistoj (Ombudsman). La partioj ekzistos ne kiel balotapogantoj, sed kiel rondoj por tiuj, kiuj interesiĝas pri politiko por kune pridiskuti, proponi, ktp.*

**LA VENONTA JARCENTO**

*Verŝajne la nuna situacio daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn plu : 10, 20, 30, neniu scias. Sed eble en la mezo de la venonta jarcento multe da aferoj estos ŝanĝiĝintaj.*

**Ekonomio :**

*Ne eblas, ke en tiom evoluinta socio, kun egaj produktkapabloj, restus pli kaj pli grava parto de la popolo en mizero (jam 35 milionoj da mizeruloj en Usono). Sendube la kapitalismo fiaskos kaj la homoj starigos novan sistemon. Jam estas pluraj proponoj : socialismo, komunismo, distribua ekonomio de Duboin kaj aliaj. DUBOIN proponis, ke oni laboru nur por provizi siajn bezonojn. La mono ne povu akumuliĝi, sed estu anstataŭigita per mono, kiu malaperus post uzo. Li konsilis ankaŭ ekonomian egalecon. Verŝajne estas ankaŭ aliaj sistemoj, kiujn mi ne konas* ; aŭ kiujn oni ankoraŭ ne malkovris. Ĉiuokaze necesos elekti, trovi novajn vojojn, ĉar oni ne povos transiri de kapitalismo al socialismo rekte. Ekzemple, ekonomia egaleco ne estus tuj akceptata de ĉiuj. Tial oni povus provizore lasi diferencon de unu ĝis tri por la plej altaj gradoj, kun tuta skalo por la diversaj gradoj. Nun en la franca publika funkcio, laŭ miaj konoj, la koeficiento de la salajroj ne superas 3. Poste oni povus redukti la koeficienton ĝis unu, t.e. tuta egaleco, aŭ ne. Aliparte, kial ĉiu civitano ne fariĝu funkciulo en socialismo ?*

*Kiel en aliaj aferoj, la teorio estas afero, sed la praktiko estas ofte malsimila : necesas adapti la teorion. Tion bone konas la inventistoj kaj scienculoj.*



**Eŭropo :**

*Verŝajne Eŭropo fariĝos, sed ne morgaŭ, laŭ la rapideco de tio, kion ili faris de post la lasta mondmilito. Ne eraru : ĝis nun ili traktis komercon kaj financon. Necesas, ke naciismo malaperu ; la nacioj estus tiam nur administraj unuoj kiel en Usono.*

**Esperanto :**

*Estas ankoraŭ bona perspektivo por la fina venko de Esperanto. Nun la naciismo svingiĝas alte, sed la modoj ŝanĝiĝas, kiel ni ĉiuj scias. Pro la naciismo ĉiuj deziras trudi siajn naciajn lingvojn. La anglo-parolantoj tute ne konscias pri la malfacileco de sia lingvo, pro tio ke ili aŭdas ĝin ekde sia naskiĝo. Multaj senpripensuloj proponas la lernadon de multaj lingvoj. Ĝenerale ili mem ne scipovas alian lingvon ol sian nacian. Sed kiam ili renkontos la malfacilaĵojn de komunikado per multaj lingvoj, verŝajne ili ŝanĝos siajn opiniojn. Kiam Eŭropo ekzistos, multaj el ni iros de unu parto de la kontinento al la alia por labori, por partopreni kongresojn, konferencojn, trejnadon, por instrui ktp, kaj necesos mastri diversajn lingvojn, se Esperanto ne estos komune uzata. Fakte estas nun nur malbonvolo, kostus malmulte por instrui Esperanton en lernejoj.*

**Ekologio :**

*Ĝi estas tre ampleksa scienco, kiun neniu tute konas. Laŭ mi, devus esti ekologia sekcio en ĉiu fako. Ekzemple, agrokulturo estas koncernata pri la protekto de la specoj, la konservado de la grundo kaj de la akvo ; industrio devas lukti kontraŭ la diversaj kemiaj polucioj ; sanfako, kontraŭ la polucioj, kiuj endanĝerigas la sanon, ktp... Cetere, oni jam laboris en la ekologia aplikado longtempe antaŭ la verdula movado, ekde la jaroj 30-aj.*

**Tria Mondo :**

*Ĝi estas la plej grava kaj malfacila problemo. Ĝi entenas proksimume la 4/5 el la homaro : la loĝantoj de malfruiĝintaj landoj, kies homoj ne estas sufiĉe*

*kleraj (60 % aŭ pli da analfabetuloj). Tre ofte ili vivas en la plej primitivaj kondiĉoj kiel antaŭ 1000, 2000 jaroj aŭ pli. Multaj estis koloniitaj. Sed pro la sendependiĝo ili refalis 100 jarojn malantaŭe. En kelkaj landoj regas milito kaj malsato. Estas ege malfacile agi nun, ĉar ofte estas diktaturo aŭ nenia registaro, ĉefoj de bandoj regas kaj interbatalas. Ĉiukaze ili estas sendependaj ; sekve, ni ne plu povas agi ĉe ili. En francaj kolonioj ni multe faris por progresigi la landojn. Se ili estus restintaj kolonioj, ili estus prosperaj nun. Bedaŭrinde, nun tiuj landoj estas pli-malpli ruinigitaj pro la kaŭzoj supre menciitaj. La hispanaj kolonioj estis liberigitaj antaŭ preskaŭ du jarcentoj. Ĉiel la hispanoj ne faris multe por instrui la popolojn. Tiel estas ia aristokratio el kreoloj kaj mestizoj kaj novalvenintoj, sed la plimulto de la popolo estas en mizero kaj nescio.*

*Eĉ kun bonvolo kaj helpo necesos en ĉiuj malfruaj landoj multe da laboro, streboj, mono kaj tempo por modernigi tiujn landojn. Tre malmultaj estas sufiĉe disvolvitaj por daŭrigi modernigon per si mem : Singaporo, Maŭricio, ktp. Krom tiuj kelkaj esceptoj, la aliaj bezonos almenaŭ du jarcentojn por eliri el la mizero.*

***Konkludoj :***

*Dum la venonta jarcento ne ĉio fariĝos perfekta, eĉ en la okcidenta mondo, sed oni povas antaŭvidi multajn pliboniĝojn. Por la Tria Mondo la malfruo estas tia, ke necesos multe pli da tempo.*

*En la framo de tiu ĉi artikolo mi ne povas elĉerpi la temon, sed nur elvoki skizon. Tamen la temo estas ja pripensinda.*

*J. **DEKER***

* Ĉe SAT-broŝurservo restas disponebla nur **"La Jaro 2000"** de Henri Muller, romano reaktualiganta la tezon de Edward Bellamy. Jen ĉi-poste, por eventualaj interesatoj, tiu de Majoro Douglas pri **"Socikredito"**. (La red.)

# Kio estas Socikredito ?

✲ ✲

✲

Senŝanĝe represis
**SAT-Broŝurservo**, 1993

Originale eldonis :

The Social Credit Co-ordinating Committee,
Gordon House, Carrington Street,
Nottingham,
Anglujo.

laboron, kaj pro tio eĉ malpli da mono elpagiĝas je laborpagoj, salajroj kaj dividendoj.

11. Ĉi tio ne estas demando pri prezo po varero, sed pri la tuta prezaro de ĉiuj varoj kompare kun la tuta sumo de ĉiuj enspezoj. Same ne estas demando pri profitoj; profitoj mem ankaŭ estas fonto de enspezado kaj, tial, eĉ se oni forigus profitojn, ankoraŭ restus tro malmulte da mono.

## EKSPORTOJ: NE ESTAS SOLVO

12. Aldone al la antaŭcititaj estas multaj aliaj kaŭzoj, pro kiuj individuoj ne havas sufiĉe da mono por aĉeti siajn bezonaĵojn, kaj tiujn kaŭzojn oni priskribas en diversaj verkoj pri Socikredito. Ĉi tie sufiĉas atentigi, ke la rezulto de ĉi tiu manko de mono estis facile konstatebla antaŭ la milito, kiam butikoj estis plenplenaj de varoj kaj la popolo ne povis satigi siajn plej gravajn bezonojn: kiam fabrikejoj ne funkciis kaj homoj estis senlaboraj.

13. Pro tio, ke la enlanda merkato estis limigita, oni faris grandajn penojn por vendadi eksterlande. Ĉu el ni scias, ke la ĉefa celo de ĉiu industria lando estas *elsendi* pli kaj pli grandajn kvantojn da varoj (kiuj enkalkulas servojn) eksterlanden, interŝanĝe por malpli kaj malpli grandaj kvantoj da varoj *ensendataj* de aliaj landoj. Ĉi tion, strange, oni nomas "la havigo de *favora* komerca bilanco".

14. Ĉiu industria nacio partoprenas ĉi tiun komercan militadon. Sed kio okazas kiam *ĉiu* nacio strebas por eksporti pli ol ĝi importas? Oni ne povas eksporti al la luno. Do, la konkurado por vendi eksterlanden fariĝas pli kaj pli akra, kaj la rivaleco por merkatoj kaŭzas malbonvolon, kiu etendiĝas en la politikan sferon. La milita batalado "solvas" la problemon, kiamaniere eksportadi pli ol oni importadas: kaj tiel la ekonomia batalado kondukas al milita batalado. La kapto de merkatoj eble ne estas la ĝenerale dirita kaŭzo de militado, sed UNU EL LA PLEJ GRAVAJ FUNDAMENTAJ KAŬZOJ DE LA MILITADO ESTAS LA MANKO DE MONO EN LA ENLANDA MERKATO DE ĈIU LANDO.

15. La nuntempa sistemo ne kapablas porti la ŝarĝon de abundeco. Ĝi estas arkaika. LA HOMARO KLOPODAS ORGANIZI EPOKON DE "BULLDOZERS" (MEĤANIKAJ ELFOSILEGOJ) LAŬ LA PRINCIPOJ DE LA PIOĈO KAJ ŜOVELO.



## TRI POSTULOJ

16. Dum militotempo, tamen, estas "pli da mono cirkulanta" kaj, se troviĝas la homoj kaj la materialoj, ĉio ajn, kion oni bezonas, estas produktata. La fakto, ke niaj rimedoj grandparte uziĝas por detruaj celoj estas ekster la argumento. La grava afero estas, ke oni trovas la monon kaj uzas niajn rimedojn ĝislime.

17. Socikreditanoj asertas, ke niaj rimedoj devus esti ĝislime utiligataj en pacaj periodoj ankaŭ: alivorte, ke nia povo de aĉeto devas esti egala al nia kapablo de provizo.

18. Kaj pro tio, LA UNUA SOCIKREDITA POSTULO estas, ke iu publika aŭtoritato (LA NACIA KREDITA DEPARTEMENTO) devos esti starigita por konstati kiom da ekstra mono oni bezonas por ebligi al la popolo aĉeti ĉion, kion ili bezonas el tio, kio estas produktata.

19. La Ŝtato tiam kreos kaj distribuos ĉi tiun novan monon. (Vidu paragrafon 27). Sed nur eldoni aldonan monon kondukus, kiel ni scias el la sperto, al plialtiĝantaj prezoj, kaj ĉiuj problemoj de prezŝveliĝo.

20. LA DUA SOCIKREDITA POSTULO estas, tial, ke oni devos distribui la monon tiamaniere, ke la prezoj ne altiĝu. (Vidu paragrafojn 31 kaj 32).

21. Dum potence funkciigata maŝinaro progresie malpliigas la bezonon de homa laboro, LA TRIA SOCIKREDITA POSTULO estas, ke enspezoj ne devos dependi sole de "dungado". (Vidu paragrafon 34).

## DE KIE LA MONO DEVENOS? (LA NACIA KREDITA DEPARTEMENTO)

22. De kie la nova mono devenus? Unue, ĈU VI SCIAS DE KIE MONO DEVENAS NUNTEMPE?—kie ĝi komenciĝas, kaj kiu fabrikas ĝin? Kompreneble, mono ne komenciĝas kiel laborpagoj.

23. Mono konsistas ne nur el moneroj kaj presitaj notoj, sed ankaŭ el personaj saldoj en bankoj. Bankaj saldoj efektive estas sumoj, kiujn la bankoj ŝuldas al personoj, kiuj transdonis monon al ili. Ili estas, laŭ ĉiu vera senco de la vorto, "mono", kaj oni nek severe, nek rigore, distingas inter tiu mono kiun oni portas "en la poŝoj", kaj tiu mono, kiun oni havas "en la banko". La plejmulto de la mono estas en la formo de bankaj saldoj. Kiamaniere ĉi tio evoluis?

# Kio estas Socikredito?

## LA GRAVECO DE LA INDIVIDUO

1. Nacioj kaj Ŝtatoj, en la daŭro de tempo, akiris en la homa menso personecojn tute apartajn de la popolanoj, kiuj konsistigas ilin. "*John Bull*" havas sian propran ecaron, kaj same ankaŭ havas "*Uncle Sam*", apartan de la ordinara Brito aŭ Norda Amerikano. Grade, multaj homoj fine kredas, ke la Ŝtato estas io pli granda kaj nobla ol la individuaj Ŝtatanoj, kaj ke ĝi rajtas postuli iliajn sendisputajn obeadon kaj servadon.

2. Socikredito, tamen, rigardas ĉiujn gevirojn kaj geinfanojn kiel superege gravaj. LA SOLA RACIA MOTIVO POR LA EKZISTO, KAJ DE LA PLEJ HUMILA GRUPO KAJ DE LA PLEJ POTENCA ŜTATO ESTAS, KE ĜI ALDONU ION AL LA FELIĈO AŬ BONO DE TIUJ, KIUJ KONSISTIGAS ĜIN. La ideala komunumo estas tiu, kiu ebligas la plej grandan bonon al siaj anoj, per kiel eble plej malmulte da entrudo en iliaj personaj aferoj.

## LA CELO DE LA INDUSTRIO— LABORO, AŬ VAROJ?

3. La moderna civilizacio havas por sia kredito grandajn atingaĵojn kaj grandajn eblojn: ĝi ankaŭ havas multajn difektojn kaj malsukcesojn.

4. Ni estas elpasintaj el la epoko de manmetio, kaj nun estas enenintaj en la epokon de la potencmaŝino. Ni utiligas vaporan potencon, elektran potencon, kaj la potencon de la eksplodmotoro. Des pli ni uzas potence funkciigatajn maŝinojn, ju pli ni malpliigas la bezonon de la homa penado. MALGRAŬ TIO, ONI ŜAJNE ANKORAŬ KREDAS, KE LA PROBLEMO DE SENLABORECO ESTAS PROBLEMO DE LABORPROVIZADO!

5. Socikreditanoj neas, tamen, ke unu el la ĉefaj celoj de fabrikado kaj komercado estas doni laboron al la homoj. La inĝeniero ĉiam provadas atingi siajn rezultojn per la plej malgranda peno, ĉu homa, ĉu meĥanika. LA SOCIKREDITA RESPONDO AL LA DEMANDO: "KIO ESTAS LA CELO DE LA INDUSTRIO?" ESTAS TIU DE LA INĜENIERO—LA VERA CELO DE LA INDUSTRIO ESTAS PROVIZI, PER LA PLEJ MALGRANDA PENO (AŬ LABORO), LA VAROJN KAJ SERVOJN, KIUJN LA HOMOJ BEZONAS.



6. Bedaŭrinde, laŭ la nuntempaj aranĝoj, se homo ne posedas monon, li ne povas havigi al si tion, kion li volas—oni povas preskaŭ diri, ke li ne havas rajtigilon por vivi. La plejmulto da personoj ricevas sian monon per laborpagoj kaj salajroj, kiujn ili ricevas pro "laboro". Socikreditanoj kredas, ke pro tio, ke en normalaj cirkonstancoj ne plu troviĝas laboro por ĉiu, la pagado pro laboro farita ne plu devus esti preskaŭ la sola fonto de monaj enspezoj.

7. Laborado, por fari kaj distribui la aĵojn, kiujn oni bezonas, klare estas necesa: krom tio, la necesecon kaj dezirindecon de laborado oni ne povas akcepti kiel konsentita.

## LA MANKO DE MONO

8. La Epoko de Potenco klare ebligas pli grandan kvanton kaj pli grandan variecon de materia riĉeco. Moderna komunumo nun povas produkti sufiĉon por starigi pli altan vivnormon ol estis ebla antaŭ cent jaroj. Tamen, la plejmulto da individuoj ĝenerale ne povas ĝui ĝisplene ĉi tiun pli altan vivnormon pro tio, ke ili ne havas sufiĉe da mono por aĉeti tion kio estas produktita. Povas esti, ke iuj personoj havigas al si pli ol justan porcion de la havebla mono, sed la *tuta* monprovizo estas malsufiĉa, kaj nenia ajn skemo de redistribuado povas igi ĝin sufiĉa.

9. La plejmulto da personoj ricevas sian monon en la formo de laborpagoj kaj salajroj pagitaj al ili pro laboro farita, aŭ pro servoj plenumitaj, aŭ en la formo de dividendoj el gajnoj distribuitaj. Iuj el ili, kiel kuracistoj kaj butikistoj, ricevas sian monon en la formo de honorarioj, aŭ gajnoj, ĉerpitaj el la laborpagoj, salajroj, aŭ dividendoj de la aliaj civitanoj. Iuj aliaj, tiaj kiaj ŝtatoficistoj, anoj de la militistaro, kaj maljunaj pensiuloj, ricevas sian monon el la impostoj, kaj lokaj kaj naciaj, pagitaj de la laborpagatoj, la butikistaro, la kuracistaro, k.t.p. Resume, ĈIUJ ENSPEZOJ KOMENCIĜAS KIEL PAGOJ EL LA INDUSTRIO distribuataj dum la provizado de varoj kaj servoj.

10. Nu, ĉiuj el tiaj pagoj ŝveliĝas la finan prezon de la varoj. Sekvas, ke la tuta sumo de prezoj neniam povas esti malpli granda ol la sumo de la enspezoj. Tial, se ĉiu monero elpagata en laborpagoj, salajroj kaj dividendoj, ne elspeziĝas por aĉeti la produktaĵaron de la industrio, io devas resti nevendita. Kaj ni scias, ke oni ne elspezas la tutajn enspezojn. Iom oni ŝparas kaj iom oni procente plasas. Varoj ankaŭ restas nevenditaj, kiam kompanioj ne distribuas siajn plenajn profitojn, sed metas parton en "reservon". Se multaj varoj restas nevenditaj, rezultas malpli da mendoj por novaj produktaĵoj, malpli da personoj trovas

24. Bankoj, kiel la plejmulto el ni scias, pruntedonadas monon. Multaj personoj opinias, ke la bankoj pruntedonadas nur monon, kiun ili ricevis de sia klientaro, por prizorgado. Sed KIAM BANKOJ PRUNTEDONAS MONON, ILI TUTE NE REDUKTAS LA KONTON DE KIU AJN KLIENTO, kaj ĉiu kliento ankoraŭ havas egale tiom "en la banko" kiom antaŭe. La pruntoj reprezentas NOVAN monon.

25. Tiuj, al kiuj la bankoj pruntedonadas monon—ĉu la Registaro, kompanioj, aŭ privataj individuoj—uzadas ĝin por fari pagojn al aliaj personoj, kaj tiuj aliaj finfine repagas la monon en la bankojn. Tiamaniere la bankoj rericevas la monon, kaj la saldoj de la klientaro estas pligrandigataj laŭ la sumoj enpagataj.

26. En Britujo, de Septembro 1939 ĝis Decembro 1944, pli ol £2,750,000,000 estis KREATA tiamaniere. Ĉiu monero el ĉi tio rezultis el nova ŝuldado al la bankoj. DO, NE ESTAS IA AJN MALFACILAĴO JE LA KREADO DE NOVA MONO.

27. Socikreditanoj opinias, ke ne estas juste, ke nova mono kreiĝu nur tiam, kiam aŭ Registaroj aŭ la industrio aŭ personoj fariĝas pli enŝuldiĝataj de la bankoj. Ili asertas, ke estas la rajto kaj la devo de la Ŝtato (pere de la Nacia Kredita Departemento) krei kaj distribui, por la popolo, la tuton el la nova mono kio, de tempo al tempo, fariĝas necesa.

## VENDADO SUBKOSTA

## (LA JUSTA PREZO)

28. En Britujo, dum la militjaroj, ovoj, faruno, pano, avengrio, viando, terpomoj, sukero, lakto, lardo, karotoj kaj ŝinko estis vendataj malpli kare ol ili kostis finance. Socikreditanoj proponas, ke la principo de "vendado subkosta" estu etendita je la tuta amplekso de podetalaj varoj kaj, ke la Nacia Kredita Departemento anoncu, de tempo al tempo, la ĝustan procenton je kiu prezoj devas esti malpliigataj.

29. Krom, eble, en tempoj de grava katastrofo, tio kion oni povas aĉeti por sia propra uzo nur estas proporcio de la tuto, kion oni povus provizi. Socikreditanoj proponas, ke la normala vendoprezaro de la tuta podetala vararo estu alĝustigata en simila proporcio, por tiamaniere fari tion, kion Socikreditanoj nomas la JUSTA PREZO.



30. Ekzemple, se en unu jaro la popolo kiel tuto aĉetas nur kvar kvinonojn de tio kion ili aĉetus, se ili povus pagi por ĝi, Socikreditanoj asertas, ke la prezaro en la butikoj devas esti malaltigata je unu kvinono. La rezulto estus, ke la popolo povus aĉeti ĉion kion ili volus, ĝis la limo de tio kion oni povus provizi.

31. En la nuna sistemo tiun sumon, kiun la podetalisto perdas kiam, laŭ registara ordono, li vendas varojn subkoste, la Registaro repagas al li per subvencioj el la impostoj. En Socikredita sistemo tiun sumon kiun la podetalisto perdus, la Ŝtato repagus al li el NOVA mono kreita de ĝi tiucele.

32. La plejmulto da personoj nur rimarkus, ke la prezoj en la butikoj falis, kaj ankoraŭ havante la saman kvanton da mono por elspezi, ili tamen povas aĉeti pli da varoj. Stokoj estus elvenditaj, kaj mendoj refluus al la magazenoj kaj fabrikejoj ĝis niaj rimedoj estus plene eluzataj—aŭ ĝis la bezonoj de la popolo plenkontentiĝus.

## LA NACIA DIVIDENDO

33. Tamen, kiom ajn malaltiĝas prezoj, varoj neniam estas malkaraj por homo sen mono. Ni devas fronti la fakton, ke la maŝinoj ne nur pligrandigas la produktadon, sed ankaŭ eloficigas la laboristojn kaj, ke ni devas satigi la bezonojn de tiuj, kies laboro estas "ŝparata".

34. Socikredito provizus al ĉiu viro, virino kaj infano NACIAN DIVIDENDON *aldone al laborgajnoj*: tio estas, monan enspezon bazatan sur lia aŭ ŝia dividaĵo el la heredita riĉaĵaro de la lando, kiu kreskus laŭ la pligrandiĝo de la nacia produktado, aŭ malkreskus se, kaj tiam, kiam pro kiu ajn kaŭzo, la produktado malkreskis.

35. Ĉiu naskiĝatestilo, por tiel diri, estu akcia atestilo en Granda Britujo. Tiu akcio ne necese signifus, ke oni posedas la rimedojn de produktado: ne multaj el ni verdire volas posedi la arbon, sed la plejmulto el ni volas ĝui la frukton!

36. La Justa Prezo kaj la Nacia Dividendo formus fluejojn tra kiuj fluus en la poŝojn de la popolo la ĝusta sumo de nova mono kiun oni bezonus por nuligi la norman deficiton inter la prezo de tio, kion la popolo kunlaborante povas produkti, kaj de tio, kion, kiel aro de individuoj, ili povas elspezi.

## LIBERECO DE ELEKTADO

37. La proponoj de Socikredito povus esti aplikataj grade. Finfine ili starigus aŭtomatan ekvilibron inter la popola povo de aĉetado kaj la nacia kapablo provizi tion kion la popolo postuladas. Ili ankaŭ funkcius kiel perilo per kiu individuoj mem—kaj ne iu ajn aŭtoritato *por* ili—decidus pri ĉio, kio devus proviziĝi.

38. La individuo devus esti tute libera elekti kaj aĉeti tiujn aĵojn, kiujn li deziras. Komunumo ne estas Socikredita nur pro tio, ke ĉiu civitano estas sufiĉe vestata, endomigata, kaj nutrata. Ĉiu plenaĝulo tiom, kiom akordas kun la rajtoj de aliaj, devus esti libera elekti la tipon de vestaĵoj kiujn li volas porti, la lokon kie li volas loĝi, la tipon de domo en kiu li volas loĝi, kaj la specon de nutraĵo kiun li volas manĝi. Li devus ankaŭ esti libera ekzercadi sian elekton en aliaj direktoj, kaj havi la liberecon ŝanĝi sian intencon.

39. Socikreditanoj konstatas, ke la plej bonaj metodoj por efektivigi siajn principojn devas dependi, tre multe, de la ĝeneralaj cirkonstancoj. Ili insistas, tamen, ke la popolo de ĉiu lando havu la eblecon aĉeti ĉion, kion ili deziras el tio, kion ili povas produkti kaj povas havigi al si interŝanĝe por siaj eksportaĵoj.

40. Socikredito ne pretendas solvi ĉiun homan malagrablaĵon. Tamen, ĝi ja pretendas, ke la Homaro rajtas kaj devas uzi kaj ĝui sian vivadon sur ĉi tiu tero, kaj ke ĝisnunaj metodoj malsukcesis kaj malsukcesados doni al la Homaro lian plenrajtan heredaĵon de Libereco kaj Abundo.

41. Fine, SOCIKREDITO NE NUR ESTAS SKEMO DE MONREFORMO. Ĝi estas multe pli ol tio. Ĝi estas doktrino pri la Vivo, kiu konsideras, ke la kontentigo de la korpa, mensa kaj spirita bezonaro de ĉiu viro, virino kaj infano estas la unua kaj la plej vera celo de la homa socio.

El la angla lingvo tradukita de J. W. Leslie.

*Presita de*
*The Esperanto Printers, Limited*
*57. Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo*





## KIO ESTAS SOCIKREDITO ?

*SOCIKREDITO estas la nomo kiu alkroĉiĝis al iuj ideoj, kiujn originale publikigis Majoro C.H. DOUGLAS en 1919. Ili unue aperis en la paĝoj de* ***The New Age (La Nova Epoko)****, sub la redaktado de la mortinta A.R. Orage, kaj poste disvolviĝis en* ***Economic Democracy (Ekonomia Demokrateco)*** *kaj aliaj verkoj.*

*Majoro Douglas estis ĉefinĝeniero kaj administranto en Hindujo por la British Westinghouse Company. Pliposte, la Brita Registaro dungis lin por konstrui subteran fervojon por la Poŝta Departemento, de Paddington ĝis Whitehall, distriktoj en Londono. Dum la unua mondmilito, kiel help-intendanto de la Royal Aircraft Factory, en Farnborough, li esploris la kostkalkulan sistemon tie. Dum sia laboro en tiu esplorado, li alvenis al tiuj konkludoj, kaj elpensis tiujn teoriojn, kiujn nuntempe oni nomas SOCIKREDITO.*

### ESPERANTISTOJ !

*Tio, kio instigis al Doktoro L.L. Zamenhof elpensi kaj donaci al la homaro sian lingvon Esperanto, estis profunda sopiro al vera PACO kaj HOMFRATECO inter la homoj de la tuta mondo.*
*Tio, kio instigis al Majoro C.H. Douglas pripensi kaj fine elpensi la Novan Ekonomian Principaron, estis ankaŭ profunda deziro elradikigi la ekonomian mizeron kaj ĝian ĝemelon, la Militadon, inter la popoloj.*
*La bazaj celoj de Socikredito kaj Esperantismo estas la samaj.*
*Socikredito ne estas politika teorio. Ĝi estas severe scienca ekonomia analizo de la nuntempa monsistemo de la mondo, kune kun scienca proponaro por certigi, ke la natura dio-donacita abundo en la mondo estu distribuata al la homaro.*
*La fina celo de Esperantismo tute ne estas realigebla sen Socikredito.*
*Ni invitas al vi, esperantistaj gefratoj, studu Socikrediton, kaj subtenu nin reciproke.*

Noto de la red. : La ĉi-supra teksto tiel prezentis Socikrediton kaj alvokis esperantistojn al kunlaborado. Bedaŭrinde, mi ne scias ĉu ankoraŭ ekzistas tiu movado. Ĉu iu povus informi kaj eventuale doni adreson ?

# Skribaĵetoj

## EVIDENTE, SED ...

1 * Multaj politikaj partioj promesas "ŝanĝi la vivon". Okaze de la balotkampanjo por nova parlamento en Francio anarkiistoj surgluis murojn per jena afiŝo : "Se balotado povus ŝanĝi la vivon, jam de longe ĝi estus malpermesata." Evidente, sed ...

2 * Fiŝkaptistoj detruas fiŝojn importitajn ; kultivistoj... fruktojn kaj legomojn venantajn de aliaj landoj. Tial ke tio endanĝerigas ilian enspezon. Evidente, sed ...

3 * En multaj relative bonstataj landoj de nia mondo iuj politikaj partioj - ne nur la ekstreme dekstraj, naciistaj - volas resendi la enmigrintojn eksterlanden. Laŭdire, ĉi-lastaj forprenas laboron de la "indiĝenoj". Evidente, sed...

4 * Ĉie en la mondo la maŝinoj, la aŭtomatoj, la komputoroj, anstataŭas la homan laboron. Kion plu postulas la homoj elĵetitaj el la produktada procezo ? Laboron ! Eventuale, per dispartigo de la homa laboro ankoraŭ necesa... Sed kial ne postuli dispartigon de la senĉese kreskanta amaso da produktitaj varoj ? Evidente, ĉu ne? sed...

5 * Laŭdire, la nun tutmonde reganta ekonomia sistemo funkcias malbone. Aŭ eble... tro bone ? Ĉar la profiton oni ĝis nun ĉiam ĉerpis nur el la disvendado, oni produktadis por disvendi, ne nepre por kontentigi veran bezonon. Sed la monon posedas ja nur tiuj, kiuj jam havas ĉion superflue. Iu iam skribis : "Kiu ne povas aĉeti, tiu malprosperigas tiun, kiu disvendi ne povas." Evidente.


6 * Ĉu la politika povo povas ion ŝanĝi en la meĥanismo de ekonomio ? En landoj iam strebintaj al socialismo oni kun entuziasmo bonvenigis la tiom sopiratan liberalismon kaj ties merkat-ekonomion. Oni celis pli da komforto, pli da konsumotaĵoj... Evidente, sed kian rezultaton oni atingis ?

7 * Ĉiu lando celas kiom eble plej eksporti, kiom eble malplej importi. Ĉu do eksporti sur la lunon ? Evidente, ne. Prefere detrui surloke. Aŭ vidu ĉe § 2.

8 * Ju pli nepre interdependaj - politike kaj ekonomie - fariĝas la popoloj en la mondo, des pli ili emas al apartiĝo kaj "sendependeco". Ĉiu deziras propran naciŝtaton, propran armeon, propran flagon, propran ekspluatistaron... Ĉu povas unuiĝi nur tio, kio antaŭe dissplitiĝis ĝis la plej eta ero ? Ŝajnas evidente, sed...

(daŭrigo - ve! - sur p.48)





# ĉies VIDPUNKTOJ

## SURTERPIEDE

La ideojn de Jean Déquaire esprimitajn en lia artikolo **"La piedoj surtere"** (L!99, p.3) mi ne tute komprenas. Ĉu eble mi malpli, aŭ alie, ol li evoluis el la Spartacus-Ligo ?

Laŭ li anarĥiismo eblas nur en malgrandaj grupoj de primitivaj popoloj. Sed eĉ tiuj homoj iomete interdiskutas (egalrajtaj, laŭ Johano) pri tio, kion ili faros, ekz. al kiu loko transloĝiĝi. Tio eble postulas nur du horojn jare. Inter miaj samfamilianoj, vivantaj iom malpli primitive ĉar uzantaj pli evoluintan laborilaron kaj verŝajne (!) pli malsimplan kulturon, ni postulas iomete pli da tempo por diskuti la organizadon kaj la farotaĵojn. Eble dudek horojn jare. Samrajte diskutas tion ni, t.e. mi kaj edzino ofte, malpli ofte (ĉar ili loĝas en aliaj domoj) niaj gefiloj kaj genepoj ; temas pri kulturaj kaj distraj aferoj kaj pri interhelpo. En mia laboro ni uzas eble la saman kvanton de dudek horoj jare por diskuti la organizadon kaj "politikon" estontajn : ni tamen devus pasigi multe pli da tempo por fari tion, eble cent horojn jare, unue por transpreni multan organizlaboron el la manoj de niaj oficialaj mastroj, kaj due por uzi iom malpli da tempo por nia speciala produkta laboro, tiel ke ne necesas havi senlaborulojn.

Mi povas vidi nur kvantan, ne kvalitan, diferencon inter ni kaj la primitivuloj, se ni pasigas sufiĉan tempon por la organizado de nia vivo, de nia laboro, de la laboro de aliuloj, kaj de nia socio. Estas vere ke teĥnikistoj havu pli da klarigpovo en la organizado, sed nur koncerne sian propran teĥnikon. Pri la rezultoj de ilia teĥnika laboro devas ni ĉiuj diskuti kaj decidi, samrajte, ĉar temas pri la bono aŭ malbono por la tuta socio. Krome, se la teĥnikistoj ricevas la saman salajron kiel la aliaj (ilia teĥnika lernado ja ankaŭ estu, kaj ofte jam estas, pagata de la socio kaj ili ja ne deziru postuli pli el la rezultaĵoj de la komuna laboro!), ne ekzistas kialo por ili por uzi siajn specialajn kaj limigitajn konojn por mem riĉigi sin. Se ni ne deziras kapitalismajn ekspluatadon kaj materialperdiĝon, ni ne povas ne postuli ke ĉiuj homoj egalvaloru kaj egalsalajratu. La "respondeculoj" (cetere ni ĉiuj estas respondecaj pri io) havu pli da decidpovo, nur en la

*zon. Rapide, Esperanto iĝos nur komunikilo inter rivalaj bandoj, en kiuj ni retrovas famajn teranojn : Johano Sans Terre (Johano), Cyrano de Bergerac, Ulysse, Jésus-Christ kaj eĉ... la aĉe memoratan Goering. Rabadoj, agresoj, militoj... jen estas la Mondo de l' Riverego. Esperanto iafoje servas por traktadoj. Tiel estas la unua mesaĝo de P.J. Farmer : La homaro neniam forigos sian violenton. Eĉ Esperanto povas nenion kontraŭ tiu ĉi homara violento. En Mondo de l' Riverego eĉ diktatoroj parolas Esperanton !*

*Tamen P.J. Farmer pensas, ke individua pliboniĝo eblas. En tiu ĉi sagao troviĝas pripensebla ekzemplo de tia pliboniĝo. Kiam ni retrovas Goering, li estas, ankoraŭ kaj ĉiam, fikanaĵlo estranta fiularon. Dum iu el la multaj bataloj fortega surkapa frapo senkonsciigas lin. Vekiĝante, Goering ne plu estas la sama homo. Kia ŝanĝo ! Li iĝos eĉ ĉefpredikanto de Eklezio de la Dua Ŝanco, kies oficiala lingvo estas... Esperanto. Goering predikos amon, fratecon inter homoj en Mondo de l' Riverego ! Jen estas la dua mesaĝo de P.J. Farmer : nur ekkonsciiĝo (surkapa frapo aŭ piedbato al postaĵo kiel vi preferos) plibonigos nin.*

*"Ĉiu estis revivigita en la Mondo de l' Riverego. Se vi ne estis citita en mia sago, tion ne volas diri, ke vi ne partoprenas la aventuron" antaŭavertas P.J. Farmer. Eble, unu tagon, sidante ĉe la Esperanta Riverego, mi pripensos la demandon de Marcelo Leereveld : "Ĉu Esperanto plibonigas nin?".*

***(So Riko)***

***(*) Titoloj de la sagao de Farmer***

*Franclingve :* Le Fleuve de l'Eternité *kiu grupigas :* Le Monde du Fleuve, Le Bateau Fabuleux, Le noir dessein, Le labyrinthe magique *ĉe eldonejoj Livre de Poche aŭ J'ai Lu*
*Anglalingve :* To your scattered bodies go, The Fabulous Riverboat, The dark design. *Mi ne scias pri la kvara.*

## Reago pri Rimarketo de Igorj

(L! 103)

Estimata Samideano Igorj.

Unue mi volus danki al Vi pro Via reago pri mia artikolo "Naskiĝlando de Esperanto". Tamen mi devas konfesi, ke Via rimarketo tute min mirigis.
Ĉiu ja povas havi sian propran opinion. Vi skribis, ke ŝtato Pollando estis nur parto de Ruslanda Imperio. Fakte Vi pravas, sed tio ne montras, ke Pollando ne ekzistis. Eble sur la geografiaj kartoj kaj en monda politiko Pollando ne ekzistis, sed sciu, ke en koroj de Poloj Pollando ĉiam ekzistis. Kaj tio estas grava.
Ni ankaŭ ne povas diri, ke Esperanto estas frukto de la Ruslanda kulturo. Kaŭzo estas tia, ke Zamenhof, Grabowski, Bein - grandaj pioniroj de Esperanto - sentis sin Poloj.
Ankaŭ en libroj prezentantaj historion de Lingvo Internacia Vi trovos, ke Esperanto naskiĝis en Pollando. Kiel ekzemplon mi citos frazon finantan leteron (lingva ekzerco) el lernolibro de Edward Malewicz "Aventuro kun Esperanto" (paĝo 131) :
"Mi Vin kore salutas el la naskiĝlando de Esperanto". Aŭtorino de la letero skribas el Pollando.
Vi skribas, ke ne gravas en kies teritorio naskiĝis Esperanto. Eble ne, sed por homoj, kiuj interesiĝas pri historio de Esperanto tio gravas. Esperantologio ja instruas, ke Polo kreis Esperanton kaj ke la lingvo naskiĝis en Pollando. Ĝi estis kreita je la pola tero, momente parto de Ruslando, sed pola.
Due, celo de mia artikolo ne estis disputo ĉu Pollando estas naskiĝlando de Esperanto (malgraŭ ke mi pensas, ke jes), sed helpo al Lingvo Internacia. Mi volus memorigi la celon de mia artikolo : TIOM MULTE KIOM NI BEZONAS ESPERANTON, TIOM MULTE ĜI BEZONAS NIN POR KRESKI!!!
Via ekzemplo pri Bajkonuro tute ne estas simila. Ni ja ne diras pri iu kosmodromo, ni diras pri Esperanto-lingvo, kiu iam unuigu la mondon.
Kun elkoraj salutoj kaj bondeziroj **Remigiusz Grzela.**




**POLA RADIO** disaŭdigas en Esperanto du elsendojn ĉiutage :

* je la 13.30 (laŭ universala tempo) = 15.30 (laŭ la somera mez-eŭropa tempo) per la frekvencoj 31,50 - 41,18 - 41,99 - 49,22 - 200m (= 9525, 7285, 7146, 6135, 6095, 1503 KHz).
* je la 20.30 (laŭ la universala tempo) = 22.30 (laŭ la somera mez-eŭropa tempo) per la frekvencoj 41,18 - 41,99 - 48,90 - 49,22 - 200 m (= 7285, 7145, 6135, 6095, 1503 KHz).
Ĉe la malsupra adreso de Pola Radio oni povas mendi ampleksan, senpagan informilon pri la kadra semajna programo kun detaloj pri la konstantaj programeroj.
Per Pola Radio vi ricevas ĉiutagan kontakton kun Esperanto !

Pola Radio Varsovio, Esperanto-Redakcio, Box 46, 00-950 VARSOVIO. Pollando

Informis : Remigiusz Grzela

## POR TUTMONDA ADRESARO DE ESPERANTISTOJ

Oni ne devas intermiksi, konfuzi Esperantismon kaj internacian lingvon Esperanto. (Mi substrekas, ĉar mi pledas nur pri Esperanto).

La esperantismo estis necesa , estas kaj estos, eĉ kiam ĝi ne plu estos la subteno de la internacia lingvo E°. Sed internacia lingvo E° ne estas lingvo de asocio(j). Ĝi devas, kiel ĉiuj aliaj lingvoj,esti lingvo de ĉiuj, anoj de iu(j) asocio(j) aŭ ne, bonaj kaj malbonaj, amikoj kaj malamikoj, ktp.

Nun kelkaj movadoj (politikaj k.a.), ekz. ekologiistoj, adoptas (oficiale) esperanton kiel internacian lingvon. Sed kion ili faros ? Kompreneble, se ilia (preskaŭ) tuta aktivularo sekvus, ili povus uzi ĝin ĉe internaciaj renkontiĝoj, sed, eĉ se tio okazus, kion faros la aliaj anoj ? Estas eble kaj dezirinde, ke multaj el ili lernu esperanton, sed por kiu uzo ? Aliĝi al la E-movado ? Sed ne ĉiuj faros tion. Kaj la aliaj ? Ĉu ni devas rezigni, ke ili ĉesu praktikadon de la internacia lingvo ?... Aŭ ĉu ili devas krei strukturon interne de sia asocio, kiu fariĝos sendependa, preskaŭ sen kontaktoj kun aliaj esperantistoj ?

Ni pensu ankaŭ pri tiuj, kiuj lernis esperanton antaŭ pluraj jaroj. Certe, ĉe tiuj,kiuj nur lernis, estis multaj neinteresatoj aŭ ĉe kiuj ne sufiĉe kreskis la intereso. Sed ĉe tiuj, kiuj aktivis en la movado dum jaroj, verŝajne restas intereso pri la internacia lingvo, eĉ konfido pri la estonteco, se ni ne elrevigos ilin. Sed kion fari ? Ĉu nur proponi al ili reiri en la movadon, se ili deziras internacian lingvon por pli bona interkomprenado en la tuta interlingva vivo, sed ne havas tempon, intereson, eĉ monon por partopreni asocian vivon ?

Se ni pensas, ke nepre ni bezonas ilin, ĉar nia movado bezonas ilian monon (kvankam tia deziro ne estos plenumita kaj ni ĉefe perdos E-parolantojn) ni fariĝas SEKTISTOJ, por kiuj gravas nur la bona stato de la "sekto", ignorantaj ĉu aliaj* bezonas agadojn kaj monon.

Pro tio mi proponas tutmondan adresaron laŭ alia modelo. Nur unu afero estos postulata por ke oni troviĝu en tiu(j) adresaro(j) - scipovi la lingvon Esperanto. Nur unu minimuma devigo estos : helpi lingve, tradukante, donante klarigojn, eĉ nur telefonnumerojn.

Kompreneble pli granda helpo estos akceptata.

(fino sur la lasta paĝo)



## EDUKADO AL MEMMASTRUMADO

De kelkaj monatoj mi partoprenas asocion, laŭ mi diskonigendan, ĉar ĝi eksperimentas originalan edukadon al la memmastrumado. Ĝi nomiĝas "Retoj de reciproka interŝanĝo de scioj".

La baza principo estas : Ĉiu scias ion. Tiu scio povas esti transdonata al aliaj personoj, kiuj reciproke instruas aliajn sciojn. Tiuj interŝanĝoj estas sen hierarkio kaj sen mona interveno.

En Francio ekzistas nun ĉirkaŭ 200 "retoj". La movado disvolviĝas ankaŭ en Belgio, Svislando, Germanio, Hispanio, Nigra Afriko, Brazilo.

La "retoj" estas regataj de jena ĉarto :

1. La retoj konsistas el personoj asociataj aŭ ne, kies plenumota celo estas la valorigo de ĉiu individuo per la esplorado de rimedoj, kiuj ebligos la transdonadon de scioj kaj la akiradon de scioj en reciproka interŝanĝo : intelektaj, manaj scioj, scioj devenantaj de spertoj, ktp.

2. Per tiuj reciprokaj interŝanĝoj oni faciligos la eblecon interrilatigi la individuojn, inkluzive pro la fakto ke oni povos lerni antaŭ ol instrui, aŭ inverse, por celi la nepran reciprokecon.

3. Se eventuale kotizo estus necesa por la organizo de interŝanĝo, ĉiel la interŝanĝoj ĉiam estos ekstermonaj.

4. Ne estas modela regularo por la funkciado de ĉiu reto sed ĉiuj projektoj devas havi kiel bazon la reciprokecon.

5. Pri la organizado de retoj oni devas skrupule priatenti, ke ĉiu individuo estu "aganto", inkluzive ĉe la ellaborado de la informoj, de la decidpovo, la metodo kaj rimedoj de la lernado.

6. Oni devas zorgi pri la konsciiĝo de ĉiu individuo pri siaj scioj kaj por la taŭgaj rimedoj de la transdonado al la aliaj, ankaŭ helpi por la ellaborado de la postuloj de lernado.

7. Dum la interŝanĝoj de scioj oni devas priatenti la rimedojn uzatajn de la individuoj por taksi mem la lernadon kaj ĝian transdonadon, kun la ebleco proponi pli objektivajn kriteriojn ebligontajn profundigi tiun taksadon.

8. Oni ne devos forgesi, ke la retoj havas kiel celon ankaŭ la kolektivan kreadon. La interŝanĝo de scioj estas la unua paŝo al ko-

lektivaj iniciatoj.

9. Povas esti agnoskitaj kiel bonvolaj animantoj kaj salajruloj de la retoj la personoj, kiuj kapablas labori skipe kun la projekto integrigi aliajn partoprenontojn ; tiuj kiuj konscias pri la fakto, ke ili estas anoj de socio pluretna, plurkultura, diversa en siaj ideologiaj, filozofiaj, religiaj ktp. elementoj ; tiuj kiuj atentas la kunvivan kaj tolereman etoson de la interŝanĝoj, kiuj devas celi la disvolviĝon personan kaj kolektivan de ĉiu individuo kaj grupo.
La aktivado de la reto devas resti nekonfiskebla de iu ajn ideologio.

10. Laŭ la disvolviĝo de la retoj oni inventos necesajn rimedojn por la formado de la bonvolemuloj kaj oficistoj, por ke ili kapablu organizi la interrilatojn de la proponantoj kaj petantoj kaj ankaŭ la sekvon de la interŝanĝoj.

Por pliaj informoj oni povas sin turni al jena adreso :
M.R.E.S.R., BP.56, 110 Grand Place Agora, F 91002 EVRY

J.G.

---

SKRIBAĴETOJ (daŭrigo de p.40)

9 * La franclingva kanzonisto kaj poeto Georgo Brassens iam diris (proksimume), ke ekde triopo komenciĝas la stultularo. Rigardu ĉirkaŭ vi : la infanojn, la soldatojn, la t.n. "plenkreskulojn"... Pripensu ! Ĉu ne evidente ?

10 * Kaj nun memoru ! Ĉiufoje kiam farenda estas balotado aŭ iu alia granda kolektiva stultaĵo, kion petegas la estroj, la oratoroj ĉiuspecaj ? "Ni devas nepre unuiĝi..." "Ni devas fari grandan rondon..." "Ni grupiĝu por libero, paco... por savi la nacion." Ktp, ktp.

11 * De tiuj (s)kribaĵetoj ne atendu solvon, miraklan medikamenton por nia malsana mondo. Tamen foje mi diras al mi : "Se ie estas problemo, nepre ie devas kuŝi solvo." Eble samloke ? Supozeble, ne en la ĉielo kaj atingebla per preĝoj. Aŭ eble mi eraras, kaj ne venis la Savo, nur pro tio ke ni ankoraŭ ne sufiĉe konvinke preĝis ???

Kribo.



## FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO 10
## de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)

KELKAJ VORTOJ PRI LA "TABELO DE SMERALDO"

La TABELO DE SMERALDO estas citata kun granda ofteco fare de la antikvaj alĥemiistoj,kiuj konsideris ĝin kiel la fundamenton de l' Alĥemio, pro ĝia antikveco kaj legendeca origino.La legendo atribuas ĝian patrecon al Hermeso Trismegisto (=3-foje granda inicanto;en Egiptujo: Tot'),la Homo-Dio. La egipta Tot' aŭ greka Hermeso estis konsiderata kiel la enkarniĝo de l'Supera Saĝeco k tial la esoterajn instruojn de l'antikvaj inicadoj oni nomis: hermetikaj, aŭ hermetika scienco.
Ekzistis pluraj grekaj verkistoj, filozofoj k alĥemiistoj,kiuj uzis la nomon Hermeso; verŝajne,ĉi tiu nomo apartenis ankaŭ al iu egipta reĝo inicita, k al kelkaj grandaj inicitoj aŭ egiptaj hierofantoj.(HIEROFANTO:ĉefa sacerdoto, kiu faris la ceremonion de inicado en la misteroj). Kiel ajn estas, ĝi havas la saman signifon de la greka vorto: Ĥrestos' = inicito aŭ sankt-oleito, el kiu devenas la nuntempa: Kristo.
Kiel ajn estas, la libroj de Hermeso enhavas admirindan universalecon de konoj, k ili estis studataj en la antikveco en la sino de sekretaj lernejoj de inicado.
Ili traktas, citante la temojn en skemeca formo, pri himnoj honore al la Supera Estulo; devoj de la reĝoj, kiuj estis edukitaj en la sanktejoj; Astrologio, Astronomio: dividita ĉi tiu en malsamajn fakojn, kiel tiuj dediĉitaj al la planedoj, la konjunkcioj de la Suno k la Luno, ĉe leviĝo k subiro de l'Suno,ktp.; sekreta aŭ hieroglifa skribo rezervita por inicitoj; historio de la Universo kun la primitiva agado de l'principoj;studo de la Tero kun ĝiaj malsamaj regnoj; Egiptujo k Nilo; la ritoj, sacerdotoj, ceremonioj, buĉoferoj, eklezia disciplino, oferoj, festoj, funebradoj, k.t.p.; la tuta kulto; alta Teurgio (=antikva magio);filozofiaj k metafizikaj problemoj; naturo de la animo k de la Dioj ; k Medicino, kun priskribo de la homa korpo, malsanoj k kuraciloj. Laŭ la legendo li postlasis 42 verkojn.
KONKLUDE, ŝajnas ke temas pri mita, kolektiva estulo,

kies senpersoneco simbolas la Parolon evoluintan en la mondo.

LA TABELO DE SMERALDO, DE HERMESO TRISMEGISTO.

Ĝi estas reala, sen mensogo, certa kaj tre vera. Kio estas malsupre estas kiel tio troviĝanta supre,kaj kio estas supre estas kiel tio troviĝanta malsupre,por fari la miraklojn pri unu sola aĵo.Kaj same kiel ĉiuj aĵoj eliris el unu aĵo per la pensado de unu, tiel same ĉiuj aĵoj naskiĝis el ĉi tiu aĵo per adaptiĝo.
Ĝia patro estas la Suno,ĝia patrino estas la Luno;la vento portis ĝin en sia sino;la Tero estas ĝia nutristino (*). Jen la patro de l'tuta Telemo(**)de l'Universo. Ĝia potenco sur la Tero ne havas limojn.
Vi disigos la teron de la fajro,tion subtilan de tio densa, milde, kun granda zorgo. Kiu alsupras de la Tero al la ĉielo kaj tujtuje redesupras sur la Teron,kaj kolektas la forton de superaj kaj malsuperaj aĵoj.Tiel ni ekhavos la tutan gloron de l'mondo;tial ĉiu mallumo foriĝos de vi.
Ĝi estas la forta forto de ĉiu forto, ĉar ĝi venkos ĉiun aĵon subtilan kaj penetros ĉiun aĵon solidan.Tiel estis kreita la mondo.
Jen la fonto de admirindaj adaptiĝoj,indikita ĉi tie. Tial oni nomis min Hermeso Trismegisto, kiu posedas la 3 partojn de l'universala Filozofio.
Tio, kion mi diris pri la Sun-agado estas kompleta.

(*) Ili estas la 4 elementoj:Suno=fajro; Luno=akvo;vento=aero; kaj tero.
(**) Telemo: Perfekteco, sekreto, volo, Azoto (=Vitala Spirito), Odoso (=Magneta fluido).

VEKIĜI-MORTI-NASKIĜI (LA 3 ETAPOJ DE L'HOMO)
-el la 11ª ĉapitro-

En la Evangelio laŭ Sankta Johano 12-24, oni diras: "Se la tritika grenero ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola; sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto." Kaj en nepublikita libro ni havas ĉi tiujn du aforismojn: "La homo povas naskiĝi,sed por naskiĝi, li unue devas morti; kaj por morti, li unue devas vekiĝi.""Kiam la homo vekiĝas,li povas morti;kiam li mortas, li povas naskiĝi".
Ili estas 3 sinsekvaj etapoj:VEKIĜI-MORTI-NASKIĜI.
(Vekiĝi signifas:esti vekiĝinta,ne dormi,maldormi).



Se homo mortas nevekiĝinte,li ne povas naskiĝi.NASKIĜI signifas la komencon de nova kresko de la Esenco,la komencon de la formiĝo de la (vera) individueco, de nedividebla MIO, sed por NASKIĜI, LA HOMO UNUE DEVAS MORTI, nome, liberiĝi de siaj etaj emoj kaj identiĝoj. En sia vivo la homo emas al sia imagado,emas al sia stulteco, emas al siaj suferoj. La homo vivas emante al la aĵoj, identiĝante kun la aĵoj per negativaj MIOJ senutilaj. Ĉi tiuj MIOJ devas morti por ke la granda MIO, -la granda MIO pozitiva-, povu naskiĝi; SED POR MORTI, LA HOMO UNUE DEVAS VEKIĜI,tio estas, konsciiĝi pri sia propra nuleco, nome, pri sia propra meĥanikeco kaj senpoveco.
Kiam la homo estas vidinta en si mem ion kio terurajn,li decidas elimini ĝin;tamen,malgraŭ siaj fortostreĉoj li ne sukcesas, ĉio restas kiel antaŭe, k tiam li konstatas sian senpovecon, sian mizeron k sian nulecon. Aŭ kiam homo komencas koni sin mem, li konstatas ke li posedas nenion, nome, ke ĉio, kion li konsideris kiel sian,siajn ideojn,pensojn, konvinkiĝojn,kutimojn, inkluzive malperfektaĵojn kaj malvirtojn, ne apartenas al li; nenio el tio apartenas al li: ĉio estis prenita el kiu ajn loko, ĉio estis kopiita tia kia ĝi estas.
La homo,kiu sentas ĉi tion,povas senti sian nulecon. Sentante sian nulecon, ne dum momento, sed konstante, homo vidos sin tia, kia li fakte estas, kaj li neniam forgesos ĝin. La konscio pri sia nuleco donos al li valoron por "morti", nome, por rezigni (pozitive kaj por ĉiam) ĉi tiujn negativajn aspektojn pri si mem, kiuj estas senutilaj aŭ sin oponas al lia supera kresko interna.Ĉi tiuj negativaj aspektoj estas lia "falsa MIO" liaj fantastaj ideoj pri liaj individueco, volo, konscio, kapablo fari aŭ decidi, povoj kaj iniciatemo.
Sed NEEBLAS TUTE VEKIĜI SUBITE; la vekiĝo estas laŭgrada kaj malrapida.

Estas miloj da aĵoj,kiuj malhelpas al la homo vekiĝi. Estas "fortoj" kiuj tenas la homon en la revado,revado kiu ne estas normala, sed hipnota. (Ĉi tiu hipnota revado malhelpas al li vidi la veron, k konsciiĝi pri sia situacio.)
(Legi la Orientan Rakonton,ĉi tie koncize prezentitan, pri:)

LA SORĈISTO KAJ LA ŜAFOJ

La ŝafoj kutimadis forkuri, ĉar ili sciis ke la sorĉisto volas ilian viandon k felon.Sed la sorĉisto hipnotizis ilin kaj sugestis al ili ke ili estas senmortaj, kaj ke neniel damaĝus ilin esti senfeligitaj, tute kontraŭe, ĉi tiu estas procedo bonega por ili k inkluzive agrabla; poste la sorĉisto sugestis ke se io okazos al ili, tio ne venos tujtuje, k sekve ne valoras la penon maltrankvili. Krome li konvinkis ilin ke ili neniel estas ŝafoj, sed ke iuj estas LEONOJ, aliaj estas AGLOJ, kaj aliaj, POTENCAJ SORĈISTOJ. En ĉi maniero, la ŝafoj ne plu forkuradis, trankvile atendante ĝis la sorĉisto fortondis aŭ koltranĉis ilin!

Ĉi tiu rakonto perfekte ilustras la homan situacion!

KUNDALINO (el la sanskrita lingvo!) estas la povo de la imagado (aŭ fantaziado) kiu anstataŭas realan funkcion. Ĉi tiu forto agas en homo, kiam ĉi tiu revadas, anstataŭ agi; kiam li revadas anstataŭ vidi la realon, kiam li konsideras sin leono,aglo aŭ potenca sorĉisto.
KUNDALINO estas la hipnota forto,kiu tenas la homojn en ilia nuna stato (stato de hipnoto).Se la homoj konsciiĝus pri sia situacio, ili provus trovi eliron, ĈAR ESTAS ELIRO, kiun ili ne vidas, tute simple ĉar ili estas hipnotigitaj.
VEKIĜI SIGNIFAS SENHIPNOTIĜI, kaj la homo povas vekiĝi,sed tio postulas longan laboron psikologian pri si mem. Sed por ekhavi rezultojn oni devas labori en grupo aŭ ensemblo, aŭ almenaŭ du personoj. Unu sola persono povas fari nenion; li bezonas helpon. Tio estas,sen reciproka helpo neniu povas atingi ion! MAJSTRO K DISĈIPLO(J) RECIPROKE BEZONAS SIN!
Ni ripetas, homo sola ne povas vidi sin mem,sed aliaj personoj povas alporti helpon eĉ nevole, ĉar karakterizo de la homa naturo estas ke homo vidas pli facile la malproprajn neperfektaĵojn ol tiujn proprajn.
Dank'al la studado pri si, homo lernas ke li mem posedas ĉiujn neperfektaĵojn, kiujn li trovas en la ceteraj, ĝenerale parolante, do,la alia aŭ aliaj disĉiploj taŭgas al li kvazaŭ speguloj en kiuj li vidas sin mem. Sed atingi ĉi tion postulas multe da sincero.
La ĈEFAN CELON oni ne povas ekspliki ĉe la komenco, ĉar la disĉiploj ne kapabliĝis por kompreni ĝin; ĝis ili ne asimilos la esencon kaj principojn de l'psikologia laboro kaj ĉiujn ideojn konektitajn kun ĝi.
Unu el la plej bonaj ekzercoj por la Memoro pri si k por la disvolviĝo de la volo estas resti silenta, kiam necesas; nur tiel oni ekestas la mastro de si mem.
La disĉiploj devas lerni labori psikologie,ne laŭ siaj ideoj, sed kiel la majstro indikos al ili. Nur tiel la psikologia laboro povos alporti profiton al ili.



LA NEPERFEKTAĴO AŬ PRECIPA TRAJTO

La karaktero de ĉiu homo prezentas trajton, kiu konsistigas kvazaŭ akson ĉirkaŭ kiu turniĝas lia tuta falsa personeco.
La persona laboro de ĉiu devas konsisti en batalo kontraŭ ĉi tiu persona neperfektaĵo. Ekzemple, homo parolas tro; li devas lerni silenti. Homo restas silenta, kiam li devas paroli, do, li devas lerni paroli. Neniu kapablas eltrovi per si mem sian plej karakterizan trajton aŭ neperfektaĵon. La majstro devas instrui al sia disĉiplo lian precipan neperfektaĵon,kaj montri al li kiel kontraŭbatali ĝin.Nur la majstro povas fari tion. La studo de ĉi tiu ĉefa trajto k la batalo kontraŭ ĝi, konsistigas la individuan padon aŭ vojeton de ĉiu homo, sed la celo estas la sama por ĉiuj:konsciiĝi pri sia propra nuleco; tiam li estos preparita por la proksimaj kaj multe pli malfacilaj etapoj de l' psikologia laboro pri si, kiu troviĝas konektita kun tio, kion ni nomas la 4ª vojo.

LA 3 DIREKTOJ DE L' PSIKOLOGIA LABORO

La psikologia laboro de ĉiu povas realiĝi en 3 direktojn:


La 1ª direkto aŭ laborlinio povas esti utila POR SI MEM. La 2ª direkto povas esti utila POR ALIAJ. La 3ª povas esti utila POR LA ESOTERA CENTRO. (Nome, por la instruo aŭ "skolo").

LA AKUMULATOROJ DE ENERGIO DE LA HOMA MAŜINO

En la homa maŝino estas 2 etaj akumulatoroj apud ĉiu centro, kaj ĉiu el ili enhavas la substancon aŭ energion necesan por la laboro de la koncerna centro,k krome estas granda akumulatoro kiu nutras la malgrandajn.
Ĉiuj estas konektitaj laŭ la skizo en la sekvanta paĝo.
Kiam homo laboras, ekzemple,legas malfacilan libron, aŭ alsupras monton, la koresponda centro elprenas la necesan energion por tiu laboro.

Kiam akumulatoro estas preskaŭ malplena,la homo sentas sin laca, kaj haltas momenton, sed baldaŭ la 2ª akumulatoro ekfunkcias dum la 1ª sin reŝarĝas de energio prenata el la GRANDA AKUMULATORO, sed ĉar la fortostreĉo estas daŭra, kiam la 2ª elĉerpiĝas, la 1ª pleniĝis nur ĝis la duono; tial ĝi malpleniĝas pli rapide, dum la 2ª reŝarĝas nur kvaronon, kaj tiumaniere, ambaŭ akumulatoroj restas malplenaj. La homo sentas sin tre laca, preskaŭ malsana. Post momento de ripozo, li sentas la alfluon de nova energio. ¿Kio okazis? Nu, ke la centro rekte kontaktiĝis kun la GRANDA AKUMULATORO. Se prezentiĝus la kazo en kiu la GRANDA AKUMULATORO devus alfronti la danĝeron resti malplena, antaŭ ol ĉi tio povus okazi, la homo dormiĝus aŭ svenus. Tio signifas ke neniu mortas pro la fortostreĉo, kiun postulas iu laboro; estas pli facile morti pro neagado, pro mallaboremo ol pro timo fari fortostreĉojn!
La etaj akumulatoroj sufiĉas por la ordinara laboro ĉiutaga de la vivo,sed por la laboro pri si,por la interna kresko kaj por la necesaj fortostreĉoj en la 4ª vojo, la energio de ĉi tiuj etaj akumulatoroj ne estas sufiĉa. Ni devas lerni eltiri la energion rekte el la GRANDA AKUMULATORO, tial necesas disvolvi la emocian centron. La nova scio k la nova kompreno venos nur tra la emocia centro kaj ne tra la intelekta.






OSCEDO KAJ RIDO estas 2 funkcioj neeksplikeblaj por la scienco.Ambaŭ estas funkcioj (tre kontaĝaj) de la instinkta kaj motora centroj.

OSCEDO: Oni oscedas kiam oni estas laca. La oscedo havas la efikon pumpi energion en la etajn akumulatorojn. Kiam ĉi tiuj malpleniĝas tro rapide,la oscedo fariĝas preskaŭ kontinua.

RIDO: Funkcio kontraŭa al la oscedo, la rido ne ŝargas nin de energio,male,ĝi elpelas ĝin, elprenas la superfluan energion,kiu troviĝas amasigita,aŭ pli ĝuste dirite, staplita en la akumulatoroj.

La rido ekzistas en la centroj dividitaj en 2 duonojn (pozitivan kaj negativan) de la intelekta,emocia kaj instinkta centroj); sed la rido ne ekzistas en la superaj centroj ĉar en ili ne estas divido,ne estas JES kaj NE.

ĈIU HOMO HAVAS LIMIGITAN "REPERTUARON DE ROLOJ"
-el la 12ª ĉapitro-

Ĉiu homo havas limigitan "repertuaron de roloj",kiun li ludas en ordinaraj cirkonstancoj.Homo havas almenaŭ 5 aŭ 6 el ili: 1 aŭ 2 por sia familio (unu por siaj superuloj kaj alia por siaj subuloj);unu por siaj amikoj en la restoracio,kaj eble ankaŭ alia por la intelektaj babiladoj pri sublimaj temoj.

Laŭ la momentoj, ĉi tiu homo estas tute identiĝinta kun unu aŭ alia rolo, kaj li ne kapablas apartigi sin de ĝi.Vidi siajn rolojn,koni sian propran repertuaron, kaj super ĉio scii kiom limigita ĝi estas,jam signifas scii multon.

Ekster sia repertuaro, homo sin sentas malkomforta, kaj klopodas reveni kiel eble plej baldaŭ al unu aŭ alia el siaj kutimaj roloj; li revenas al la konata vojo kaj ĉiu sento de embaraso kaj nervostreĉado malaperas. Ĉiam okazas tiumaniere EN LA VIVO. Sed en la (PSIKOLOGIA) LABORO, por observi sin mem,necesas embaraso, nervostreĉado kaj malkomforto. Nur tiumaniere, homo povas lerni vidi sin.

MIRINDA KARAKTERIZO DE ĈI TIU INSTRUO ESTAS KE ĜI APERIGAS LA PLEJ BONAN K LA PLEJ MALBONAN KVALITOJN DE HOMO

Oni povas koni iun, dum multaj jaroj, kaj pensi ke tiu estas bona homo, sufiĉe inteligenta. Sed kiam oni priparolas al li iujn el ĉi tiuj ideoj, oni konstatas ke li estas tute malsaĝa. Kontraŭe, alia ŝajnas nemulte interesa, sed se oni eksponas al li kelkajn principojn de ĉi tiu instruo, oni konstatas ke ĉi tiu homo pensas, kaj ke li pensas eĉ tre serioze! ■



## MALGRANDA MANLIBRO
## DE LA AMATORA ORNITOLOGO

*Kiel pasigi siajn feriojn sen ĉiam pripensi nur pri esperanto ? Tio estis nia problemo en tiu jaro : ĉar ni jam ĉeestis en Grésillon, Bouresse kaj la itala kongreso en Torino !*

*Ni trovis en iu gazeto informon pri staĝo de ornitologio en **Parko Regiona de Brière** (Francio). Ĉu vi konas ?*


*Verdire ni jam vizitis tiun regionan parkon, sed ne per ia organizo : ni ŝatis tion, sed ne konservis memoron nedetrueblan pri tiu vizito. Ni vidis malmultajn birdojn : certe ne taŭgis la sezono, ĉar estis plena somero. Tamen ni vizitis la marĉan parton per boateto stangtirita, sed estis seka jaro, kaj ne sufiĉe alta estis la nivelo, kaj, kaj, kaj tiel plue.*

*Kie estas BRIÈRE ? En la suda parto de Bretonio, apud Saint-Nazaire, marĉa regiono, certe ne tre riĉa ! Ni multe ĝuis pri tiu ĉeesto 7-taga, kiu kostis 1600 FF al ĉiu persono, al kiuj oni devas nepre aldoni la koston de iro-kaj-reveno, sed trajne per la "vermiljona karto" oni ne tro elspezas... Ĉu vi konsentas, ke mi konsilu al multaj Laŭtuloj fari saman staĝon ? Mi trafe-maltrafe indikas al ili la adreson : Maison du Parc de Brière, 180 Ile de Fedrun, F-44720 SAINT JOACHIM. Por la telefono : 40.88.42.72 aŭ...39. Mi ne scias kiam okazos tiuj staĝoj, sed certe dum la preterpaso de migraj birdoj. Ĉio estas bone organizita : vizito al salmarĉoj, al marbordoj, promenado per boateto stangstirita, vizito al besta parko, kie la migrantaj birdoj ripozas dum sia laciga vojaĝo por refortiĝi. Ĉiuokaze oni observas diversajn birdojn sur marbordo aŭ en marĉoj, aŭ oni kaptas ilin rete, oni entabeligas ilin, ringas ilin kaj oni reliberigas ilin. Tio estis tre interesa kaj valoras la strebon !*

*Hodiaŭ mi proponas sekvontan paĝon pri OTUSOJ kaj STRIGOJ. Ĉu tio interesos vin ? Mi esperas, ke Laŭtuloj respondos JES aŭ NE... Venontfoje ni provos viziti sammaniere la **regionan parkon de Vulkanoj**, kiu estas pli apuda por ni. Ĉu aliaj samideanoj dezirus partopreni samtempe ? La temo estos aŭ geologio aŭ nitologio, aŭ alia, ne gravas*

***Paŭlo k Miŝele.***

# STRIGEDOJ




NOKTAJ RABOBIRDOJ. S=strigo. O=otuso.

.................. Orelaspektaj egretoj ĉe O, ne ĉe S.

.................. Fruntaj larĝaj okuloj.

.................. Hoka beko.



Dentaj plumoj } ebligantaj senbruan flugadon.

..................Plumhavaj kruroj.

.................. Fortaj ungegoj kiel sukerprenilo.

309 R **GUFO** 65-70 cm. La plej granda noktulo en Eŭropo. L: rokaj klifoj. K: U-o glu-glu. Bubo bubo/Eagle Owl/Uhu/Oehoe/Berguv/Gufo reale/Buho real/Hibou gd-duc

317* **ORELSTRIGO** 35 cm. K: hu-hu-hu. L: en kavaj arboj. Asio otus/Longheared Owl/Waldohreule/Ransuil/Hornuggla/Gufocom/Buho chico/Hm oy-duc

308* **MALGRANDA ORELSTRIGO** 19 cm. K: tjù-tjù-tjù. Loĝas apud homoj, sed ne facile videbla. Otus scops/Scops Owl/Zwergohreule/Dwergohreule/Dwergotuil/Dvärguv/Assiolo/Aurillo/Hp-duc.

Aliaj specoj : 318 R **MARĈOSTRIGO** = H. des marais (Asio flameus).

****

307* **TURSTRIGO 34 cm.** vizaĝo kaj ventro blankaj, longaj kruroj, rufa dorso, korforma vizaĝo. Tyto alba/Barn Owl/Schleiereule/Kerkuil/Ternuggla/Barbagianni/Lechuza com./Chouette effraie.

313* **NOKTUO** 21 cm. malgranda, ronda, supre makuletita, frunto kaj brovoj malaltaj. K: grjù-grjù/ dip-dip/ ku..ku..ku.. Athene noctua/ Little Owl/Steinkauz/Steenuil/Minervauggla/Civetta/Mochuelo/Chouette chevèche.

Aliaj specoj : 310 R **NEĜOSTRIGO** = Ch. harfang (Nyctea scandiaca)/ 320 R **FUNEBRA STRIGO** = Ch. de Tengelman (Aegolius funereus)/ 312 R **PASERSTRIGO** = Ch. chevechette (Glaudidium passerinum) : la plej malgranda.

Malamataj dum longaj jaroj, tiuj **STRIGEDOJ** estas inter la plej utilaj estaĵoj en la Naturo. Ili limigas kreskadon de ronĝuloj, kiuj detruus multajn grenojn. La elglutitaj buloj, kiujn oni ofte trovas apud la loĝejo, ebligas studi la nombron kaj specojn de ronĝuloj manĝitaj.

La numeroj estas tiuj de"Komunlingva nomaro de eùropaj birdoj" de NKORE.
R: Maloftaj bestoj *: Tre oftaj apud domoj aù urboj aù arbaroj. K : krio de la birdo. L : loĝloko.

La nomoj estas laù tiu sinsekvo donitaj : latina/GB/D/NL/S/I/H/F.



# DE JARMILOJ ŜI ESTAS BATALINTA POR KURACI

*En Helenio, Hipokrato (V-a jarcento a.K.), praktikanto de medicino diagnozon kaj prognozon entenanta, kaj disĉiploj jam atingas rimarkindajn konceptojn (ekzemple pri la rolo de la ina semo, dank'al kiu la vira povas frukti. Poste la ina rolo en koncipado estos refutata de Aristotelo). Tiutempe apartigitaj estas virinoj tial, ke estas al ili malpermesite studi. Tamen la sciotransdono prefere okazas de instruanto al disĉiplo, apud la malsanulo mem. Kaj per tiuj scikonoj profitas la virinoj, pri obstetriko jam tre lertaj. Sian tiuteman scion ili trandonas de unu al la alia, per ĝi riĉigante la virverkatajn traktaĵojn. Abortigi virinoj scipovas - kio ne estas kontraùleĝa en Helenio.*

*Al virino ne plaĉas esti esplorata de viro ; tial samseksulino post esplorado raportas al diagnozanta kaj prognozanta kuracisto ; do nur peranto estas ŝi.*

*Meze de la IV-a jarcento a.K. la centro de medicina arto translokiĝas al Aleksandrio. Fulme progresas anatomio kaj fiziologio ; unuan fojon oni dissekcadas la homan korpon ; ĥirurgio disvolviĝas, farmacio riĉiĝas per studado de mineralaj, vegetalaj kaj animalaj substancoj. En Romo, kie la Helenoj anstataùas sklavojn kaj libertinojn, virinoj jam ne plu estas nuraj perantinoj sed agnoskata estas ilia kompetenteco. Ĉirkaù 130 a.K. Claudius Galianus (franclingve Galien), la reenkondukanto de la hipokrataj principoj, tre alte taksas virinojn en kuracarto.*

*Se en la unuaj tempoj de kristanismo kuracistinoj ne estas ĉirkaùpelataj, la koncilianoj en Mâcon (581) demandas sin, ĉu animon havas virino, ĉu ŝi kalkulendas inter la raciodotitaj estuloj. Kio fariĝas kun ŝi dum la 10-jarcenta superregado de tutpotenca eklezio ? Se estas ŝi la kavalira damo kaj poetoinspirantino, nur eliton tio koncernas - specon de ina aristokrataro, kiu kompensas sian seksan laùjuran subulecon per mensokulturo kaj amludado. Tia sinteno konsistigas neordinaran provokon en tempo, kiam adul-*

*to estas ofte mortpunata. Sed la inkviziciaj procesoj ĉirkaŭpeladas la diablan ambasadorinon, ĉefan baron survoje al la animsavo ; tiagrade, ke brilaj viroj prefere sin ŝirmas de ŝia influo en monaĥejoj...*

*La nobelinoj scipovas flegi kaj iom praktiki malgravajn ĥirurgiaĵojn, ĉar devas ili zorgi pri la rehejmeniĝanta vundita kavaliro. Sed neprofesiulinoj ili estas.*

*Dum la XII-a jarcento, kiam monaĥeja kuracarto cedas la lokon al universitatoj, la virinoj (krom en Italujo) ne estas tien enlasataj kaj ĝis la XIX-a jarcento ili estos devigataj kaŝe lerni kaj praktiki.*

*Se surkampara mezepokulino malsaniĝas, ŝin helpas la monaĥoj per alcelaj plantoj kaj multe da favorkoreco. Sed kiel klarigi fizikajn suferojn al monaĥo ? Ŝi turnas sin al la t.n. "bona ino", aŭ "bela ino", aŭ "saĝa ino", kiu mildigas ŝiajn suferojn. Sed marĝeneco tiaspeca ne estas tolerebla por ekleziuloj : ke diablohelpantino korpojn resanigu, naskopovon kontrolu, eĉ abortigu, tiel ne indas. Senĉesa persekutado regas : kulpigado pri sorĉoarto, amasa ŝtiparumado... Ĉar la mezepokuloj ne scipovas la plantojn dozi (ekzemple digitalon, kiu povas esti mortiga, aŭ beladonon, kiu povas ŝajnigi la englutinton demonhava pro troa kvanto), la altaj instancoj decidas dum la XIV-a jarcento, ke sorĉistino estas virino, kiu nestudinte aŭdacas kuraci. Kaj samtempe studado estas al ŝi malpermesita. Kaj tiel estos ĝis Colbert kulpigon pri sorĉoarto absolute malpermesos.*

*Oni bone memoru, ke la helena heredaĵo transiris al Bizancanoj (inter la IV-a kaj la XV-a jarcentoj kaj Araboj (VII-a / XIII-a). En Bizanco fondiĝis la tutunuaj kristanaj hospitaloj, kie kuracistoj kaj flegistinoj (jen ekapero de nova profesio) klopodas konduti al malsanuloj, kiel al homoj, jam ne plu al suferantaj korpoj. Apogeas la araba kulturo dum la IX-a jarcento : estas tradukataj la tekstoj de la antikvuloj, asimilataj la donitaĵoj de la egipta, persa kaj hispana kuracartoj. La araba, jen la lingvo de la scienculoj, kiu reenkondukos en niajn okcidentajn universitatojn la antikvecan heredaĵon.*



*Krome en la islaman mondon ekaperas la kliniko, el kiu fontas niaj hospitalaj centroj. Dissekcado, esplorado ; tri jarcentojn antaŭ la Renesanco estas jam parolate pri sangocirkulado. La frenezuloj estas taksataj mense malsanaj, ne demonhavaj, kaj jam kuracataj pere de muziko, danco kaj teatro. Instrucentroj estas tiaj hospitaloj, kie instruon ricevas la akuŝistinoj.*

*En okcidento tamen, pro miskompreno de vera kristanismo, la animsupereco igas la korpon duaranga. La ĉefa afero konsistas el tio, ke la animo estu savata. La malsano povas esti eĉ rimedo, por ke la malsanulo mem partoprenu en sia propra elaĉeto. En monaĥejoj kaj ankaŭ en vilaĝoj oni uzas plantojn ; ambaŭloke ankaŭ magion, ĉu diablan, ĉu religian, kaj gravan rolon ludas ekzorcisto.*

*En Italujo dum la IX-a jarcento fondiĝas la unua universitato en Salerno. Montpellier- kaj Parizofakultatoj respektive datiĝas de 1220 kaj 1253. Sed ne estas enlasataj tien la ĥirurgoj-barbiroj (ĥirurgio estas konsiderata kiel manmetio), edziĝintaj viroj (ĉar inon ili estas tuŝintaj), kaj la inoj mem. Ordono de la pariza fakultato (XIII-a jarcento) malpermesas, ke judoj... kaj judinoj praktiku la kuracarton - kio pensigas, ke nemalmultaj virinoj estis kuracistoj. En Francujo (samepoke) nur la ĥirurginoj estas toleratoj ekster la urbaj muroj, ĉar edzinoj aŭ vidvinoj de ĥirurgoj kaj de ĉi-lastaj instruitaj. En 1484 edikto de Karlo la VIII-a ilin forigas el tiu profesio. Koncerne la kuracistinojn eĉ pli malbona montriĝas la situacio, ĉar ŝvebas minaco pri ekskomuniko. Tamen en Italujo pluvivas la antikveca tradicio. La universitatoj malfermiĝas al virinoj. Tion ilustras la ekzemplo de Trota (aŭ Trotula) en Salerno naskiĝinta ĉ. la jaro 1050-a. Ŝi*

estas edzino de kuracisto, kuracistino kaj verŝajne aŭtoro de traktaĵo pri malsanoj antaŭ kaj post akuŝo.

Dum renesanca virino fariĝas dezir- kaj plezurobjekto, la erudiciuloj ree prilaboras laŭopinie fuŝitajn tradukaĵojn de la antikvulaj verkoj. En 1567 aperas sumo, kiu anstataŭas la kanonon de Aviceno. Leonardo de Vinĉi "kapabla dek kadavrojn dissekcadi por sekvi la vojiradon de kelkaj vejnoj" (Paul Valéry diras), progresigas anatomion, dum Ambroise Paré estas elstara ĥirurgo. En 1628 Harvey malkovras la sangocirkuladon. Sed la pariza fakultato rifuzas la ideon kaj preferas erari kun Aristotelo, ol sekvi ĉarlatanon. Tial la dekano malpermesas, ke tia doktrino estu instruata. Kaj tiu farmaniero daŭros ĝis la kuracistoj studos en la hospitalo mem, fine de la XVIII-a jarcento.

Se scienco progresas, la kuracistina nombro malprogresas. Fine de la XVI-a jc. ili kvazaŭ malaperas - eĉ la akuŝistinoj estas pli kaj pli apartigataj kaj minacataj. Kiel povus esti alimaniere ? Virinoj estas reduktitaj al la naskofunkcio kaj post nelonge la enciklopedianoj asertos, ke ili estas ne kapablaj enkapigi tiom da konoj, kiom povas la viroj, ĉar ina cerbo pli malgrandas, ol vira.

Ni memoru, ke en 1484 ĥirurgio estas malpermesita al la ina sekso, krom al la vidvinoj de ĥirurgoj. Tamen la famaj francaj akuŝistinoj havas pli vastan kompetentecon, ol en nura akuŝigoarto. Se la surkamparaj estas malpli scidotitaj, la enurbaj devas submetiĝi al faka ekzameno kaj ricevi licencion por labori sur lokoj, kie svarmas konkurenco - ĉefe la ĥirurgoj-barbiroj, kiuj "tuŝas nerigardante", kvazaŭ ili havus okulojn ĉe la fingrofino.

Jen kelkaj ekzemploj. Louise Bourgeois, disĉiplo de Ambroise Paré, tiom okupiĝas pri la estonta patrino,kiom pri la ĵus naskita bebo. Ŝia revo estas akuŝigi Marian de Mediĉoj. Kaj la revo efektiviĝas. Ŝi deĵoras ĉe la kortego de 1601 ĝis 1627, publikigas bazan traktaĵon, modelon pri observado kaj priskribo. Ŝia profesia kaj intelekta sinteno jam anoncas la XVIII-jarcentan parizan akuŝigoskolon, kiu famiĝos tra la tuta mondo. Tiuj francaj fakulinoj fariĝos altvaloraj informofontoj kaj brilaj pedagogoj, tamen netitolataj "profesoro" aŭ "medicinisto", ĉar dum multaj jardekoj respondecos viroj pri la estonteco de obstetriko.



Dum la XVIII-a jarcento francaskola akuŝistino fabrikigas artefaritan virinon por ilustri la kursojn - kion aprobas la Scienca Akademio. Laŭ ordono de la 18-a de aŭgusto 1767 ŝi estas komisiita instrui tra ĉiuj landoprovincoj.

Aliaj du kolegino helpas al Jean-Louis Baudelocque en eks-abatejo Port-Royal, kie li instruas teorian obstetrikon. Ilin li vokas por forliberigi la patrinojn en malfacilaj okazoj. Unu el tiuj du, Louise Lachapelle laŭnome, partoprenos en pli ol 50 000 naskiĝoj. Ŝi fariĝos honordoktoro de la universitato en Marburgo pro siaj esploroj pri obstetriko, sed neniam estos akceptata de la Franca Sciencakademio, neniam ricevos la titolon "medicina doktoro".

Batali por seksa egaleco ; konkeri la titolon "medicinisto" ; eniri la hospitalon por ricevi la necesan instruadon ; akiri la rajton konkursojn trapasi, jen la ĉefaj celoj de post la revolucio ĝis la fino de la XIX-a jarcento. Foje estos necese uzi artifikojn spite la subtenon de kelkaj senpartiaj viraj personecoj. Tamen dum la XIX-a jc. preskaŭ ĉiuj opinias, ke pli-malpli histeria montriĝas virino, kiu klopodas eltiriĝi el la ĉiutagaĵoj. Studado endanĝerigas ŝian sanon. Kion diri krome pri al ŝoka mikseco kun la studentoj ?... Nur sub la tria respubliko (dum la lasta jarcentokvarono) virinoj estos ekinstruataj.

De post la revolucio la medicina gravitocentro translokiĝas de la fakultatoj al la hospitaloj, kie la finfine repaciĝitaj kuracistoj kaj ĥirurgoj alĝustigas anatomi-klinikajn teknikojn.

Tamen de ĉiam virinoj estas plenumintaj santaskojn

ĉe batalkampoj (monaĥinejoj en Francujo, protestantinoj laŭ privataj iniciatoj, poste ruĝakrucaninoj). Jam en la tempo de Napoleono la unua kalkuliĝis ĥirurginoj en la armeoj. Sed, kvankam nian atenton ni turnas precipe al la francaj historiaĵoj, ni aparte parolu pri Florence Nightingale, brila anglino, kiu estas staĝinta en germanaj hospitaloj.

En Anglujo ŝi estas la estrino de resanigejo tiel fama, ke komence de la milito en Krimeo la aŭtoritatoj sendas ŝin sur la fronton. Ŝi konsentas kaj kunprenas 37 kunulinojn. De 1854 ĝis aŭgusto 1856 ŝi nelacigeble paŝadas kun poŝlampeto enmane laŭlonge de senfinaj dormejoj, notas ĉies sanstaton, flegas, konsolas, skribas al la familioj. En la daŭro de unu jaro la mortokvanto ĉe la anglaj soldatoj malpliiĝas je 90 procentoj, dum senŝanĝa ĝi restas ĉe la Francoj. Sed ne nur senkompara flegistino ĝi estas : ankaŭ perfekta organizantino. Kaj tamen ŝi suferas konstantan kolerecon de viraj kolegoj, kiuj eĉ eldetruigas konvaleskejon dank'al la monrimedoj ŝiaj starigitan.

Kiam ŝi reenlandiĝas, la reĝino mem dankas al ŝi. Ĝis ŝi mortos oni petos ŝian konsilon pri la planoj de la civilaj hospitaloj. Ŝi fondas instrucentron por la flegistinoj. Ŝia influo estas profitdona al la unuaj anglosaksaj kuracistinoj kaj ŝi liveras tute novan inobildon.

Tamen en 1907 estas eldonita artikolo en "la Torĉo", organo de la psikanaliza societo en Vieno. Jen la enhavo : ju pli histeria estas virino, des pli lerta studento ; kaj laŭ la komuna studentoopinio ŝi aspektas prostituitino. La viroj, kiuj konsentas, ke virino studu medicinon estas masoĥistoj. Kuracistino, tio estas sensencaĵo. Neniam psikiatrino scipovos kompreni la psikajn sekretojn de viro. Kaj se hazarde virino superos siajn virajn kolegojn, ŝi trudos sian povon. Konklude : nenio bona venos por virino el studado. Krome ŝi ne kapablos viron egali en seksosublimigado.



Marie Curie, kvankam nekuracisto, ricevas la Nobelpremion pri fiziko (1903) kune kun sia edzo, sed ne estas akceptata de la pariza Sciencakademio. Ŝi vidviniĝas, ricevas duan Nobelpremion (1911), sed estas hontinde misfamigata pro sia ligiteco kun fizikisto Paul Langevin. Insultoj sonas : "Polino ! Aĉulino ! Malinda patrino !" Ŝtonoj enbatas ŝiajn fenestrovitrojn.

La unua ŝi estas esplorinta pri polonio. La unua ŝi subskribis siajn esplorlaborojn. Tamen tuj kiam la edzo (Pierre) kunlaboris, ŝi subskribis duarange; kaj al ŝi ŝajnis normale, ke oni ne enlasu ŝin en la Sciencakademion, kaj ke al ŝi oni ne permesu instrui samgrade, kiel al la edzo.

Sed post la morto de ĉi-lasta, nur ŝi estas fakulino pri la fiziko de radiado. Tial oni estas devigata aljuĝi al ŝi la ĉi-koncernan katedron.

Komence de la milito ŝi insistas pri la nerefutebla helpo alportota de radiologio sur la fronto mem, spite malan opinion de la ĥirurgoj. La iks-radioj ebligas, ke oni ĝuste lokalizu la eltirendajn pafaĵojn. 20 radiologoj kliŝadas. De 1917 ĝis la militfino la kliŝaĵoj kalkuliĝos je unu miliono.
Finfine en 1924 Marie Curie estas la unua virino en Sciencakademio.

En 1922 la Internacia Asocio de Kuracistinoj estas starigita por profesia interhelpo, regulaj debatoj pri sciencaj temoj kaj demandoj pri la publika sanstato. En Francujo ĉiujare ĉ. 70 kuracistinoj diplomiĝas, ĉefe en Parizo, Liono kaj Strasburgo. Hodiaŭ, ne pli ol 5 procentoj da virinoj instruas en la medicinaj fakultatoj.

Maria Montessori, fakulino pri pedagogio : ŝi diplomiĝas en 1896, unue interesiĝas pri neadaptitaj al la medio infanoj. En 1904 ŝi instruas antropologion en la roma universitato, poste okupiĝas pri normalaj infanoj. Se nun ŝia metodo ne plu mirigas nin, ni ne forgesu, ke ĝi estis siatempe ja sensa-

*cia, ĉar, la unua, Maria Montessori insistis, por ke oni ĉesigu infandresadon profite al valorigo de la infanpersoneco.*

*Blanka Edvardo (mi subfalas la tenton esperantigi la nomon) : Filino de anglodevena kuracisto, ŝi estas fruaĝe allogata de medicino, studas en fakultato kaj rebatas la argumentojn de la malaprobantoj de virino en kuracarto. Ŝi lernas sub Charcot, sin dediĉas unue al la virin- kaj infanmalsanoj, poste al la nervomalsanoj. Ne tre riĉas ŝia klientaro. Sian honorarion ŝi ricevas nur fine de la jaro, laŭ la monrimedoj de la pacientoj. Ŝi partoprenas en la virinaj ligoj, i.a. en tiu de la patrinoj por batali kontraŭ la infana mortokvanto. Ŝiaj inspektorinoj subtenas la freŝdatajn akuŝintinojn. Dum la jaro 1910-a 4 000 hejmoj ricevas helpon fare de ŝi, ĉar jam translima kuracistino montriĝas ŝi. Ŝi volas, ke infankulturon oni instruu en la lernejoj, ke plialtiĝu la scionivelo de la akuŝistinoj. Tiutempe en Francujo nur monaĥinoj flegas en la hospitaloj. En plena laikigado oni opinias, ke jam ne plu sufiĉas sinofero. Edukendas la flegistinoj, por ke ili kapablu asimili la konstantajn progresojn de la medicina arto.*

*En 1877 jen kreiĝas la "lernejo de la bluinoj", flegista lernejo en Salpêtrière hospitalo (la nomo devenas de la vasta blua pelerino surportata de la aspirantinoj, kiuj venas el la popoltavoloj kaj estas senpage prizorgataj dum kvin jaroj).*

*40 jarojn Blanka tie instruas fiziologion. Ŝi klopodas disvolvi higienon, luktas por forigo de korpotordaj korsetoj (kio okazos nur tempe de la milito), estas favora al seksa edukado, sed tro frue en jaroj, kiam oni instruas nur pri reproduktado... de la filikoj.*

*En 1914 ŝi instruas 400 virinojn pri urĝaj flegoteknikoj - kio konsistigas novigaĵon. Samtempa edzino, patrino kaj kuracistino, ŝi alportas rimarkindan kontribuaĵon al aliigo de la ina bildo.*

*En 1935 Irène Curie kaj Frédéric Joliot ricevas la Nobelpremion pri fiziko pro siaj malkovroj koncerne artefaritan radioaktivecon. Tia eltrovaĵo de geedza paro tiel sciavida, kiel ne moninklina, kompletigas kaj kronas la agadon de Marie. (Irène mortos en 1956 pro insida leŭkemio, postsekvo de tro longa kliniĝado super radioaktivaj korpoj).*

*

*Kaj tamen vira restas la kuracista bildo, eĉ ĉe infanoj, kvankam la publiko iom post iom familiariĝas kun la ideo esti kuracata de virino. En la komenco precipe ina estas la klientaro. Nun la pacientinoj konsentas senvestiĝi antaŭ kuracisto, sed viroj malvolontas pri tio antaŭ virino. Diversmaniere la maljunuloj reagas : se juneco kaj ineco ŝajnas ne tre fidindaj, allogas la aŭskultopovo kaj deziro klarigi elmontrataj de virinoj. Pli da tempo kuracistinoj dediĉas al siaj pacientoj, ol kuracistoj (multaj strebas partoprenigi la pacienton en lia resaniĝo, kaj tia iniciato fare de virino estas ŝatata).*

*Kuracistinoj estas kutime pli bone akceptataj en la sociale kaj kulture favorataj medioj, ol ĉe la kamparanoj, manlaboristoj, islamanoj aŭ enmigrintoj. Enketo pruvis, ke ĉefe en Eŭropo vokiĝo multe pli tiras virinojn al tiu profesio, ol monavido. Se jam multas la akiritaĵoj (rajto praktiki, diplomoj, ĉeesto en hospitaloj), estas necese finkonvinki la malsanulojn mem, kio jam estas survoje.*

**S. BONIOL**

---

**Al la legantoj en Francio :**

En tiu ĉi n-ro vi trovos peticion iniciatitan de la E-kulturcentro en Nantes kaj resendotan antaŭ junio al la adreso menciita sur la peticio aŭ al la ĉi-apuda. →
Komprenelbe, vi povas mem ĝin multobligi, cirkuligi...

Rivière Christian
5, av. de l'Air du Temps
44300 Nantes
tel : 40252405

**DANS LE CADRE DU DROIT DE PETITION AU PARLEMENT EUROPEEN**

**le Centre Culturel Nantes Esperanto,** **12 rue Alain Colas 44200 Nantes,**

**et les Signataires,**

**DEMANDENT :**

***. l'étude au Parlement Européen, de la situation linguistique actuelle, en termes de coût, d'efficacité d'apprentissage et de compréhension, d'exactitude des traductions, de respect des langues nationales et régionales,***

***. la reconnaissance de l'Esperanto comme seconde langue, dans chacun des pays de la communauté, ouvrant un droit à l'inter-compréhension,***

***. la possibilité d'utiliser l'Esperanto dans tous les domaines professionnels, comme outil de dialogue et de négociation, et sur tout support d'information habituellement multilingue (notices d'utilisation, consignes de sécurité, libellés de chèques, transports, dépliants touristiques...),***

***. l'enseignement de l'Esperanto dès l'école primaire et l'accessibilité de sa littérature dans les librairies et les bibliothèques.***

| Nom prénom | Adresse | Nationalité | Profession | Signature |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |
| | | | | |

**Ecrire lisiblement**

(daŭrigo de p. 46)

Tutmonda adresaro en unu volumo ne eblas. Ĝi estus nekompleta, dikega, ne farebla eĉ de pluraj homoj kun multe da laboro.

Do, komencante de esperanto-asocioj, inkluzivante ĉiujn kontatajn E-parolantojn en iu region(et)o (la areo varios tiel ke estu minimume unu folio), oni faru multajn adresarojn por ĉiuj landoj. Sufiĉos al tiu, kiu bezonas, elekti la regiono(j)n dezirata(j)n. Li havos tiel multe pli da kontaktebleco ol per la nun ekzistantaj adresaroj.

Mi ŝatos respondojn al tiu propono, eĉ insultojn.

**Lucien ANGEVIN**, 21 rue Bernard Lazare,
F 30740 LE CAILAR, Francio

* aliaj asocioj, ĉefe tiuj, kiuj agadas por pli da justeco, pli da bonfarto por la homaro, el kiuj la esperantistoj pensas esti.

---

## SE OKAZOS MILITO...

Se oni supozas, ke en determinita regiono de la terglobo okazos milito, tien oni sendas soldatojn, armilarojn, kuracilojn, porvivaĵojn... kaj ĉerkojn.

Se oni sendas al la batalo, ekzemple 10 000 soldatojn, en la deponejo troviĝas 1 000 ĉerkoj (aŭ plastaj sakoj, kiuj utilos kiel ĉerkoj).

Sperta stabo kalkulas, ke pereos 10 procentoj el la batalantoj. Por la vunditoj estas sendataj lambastonoj, artefaritaj gamboj, brakoj, manoj... kaj ordenoj.

Tiuj ordenoj, plej komune en formo de kruco, estas lokataj per pinglo sur la uniformo ĉe la brusto de la kripluloj ; dume la malkripluloj aplaŭdas, ĵurnalistoj fotas kaj la kameraoj de televizio dissendas la scenon.

La vero estas, ke dum milita tempo la industrioj laboras tage kaj nokte, produktante aĵojn, kiuj dum paca tempo ne estas tiom abunde bezonataj.

La kapitalisma mondo bezonas, bezonegas militon, spite ke, plenbuŝe, ĉiuj mencias la vorton "paco".

**A. Lopez Luna.**

---

**– la venonta numero aperos komence de majo –**
esperebLe kun la adresaro.

Gérant & imprimeur : Baudé – F 47470 Beauville. CPPAP 58651